

EL POPOLO CINIO

中國報

1975






Nova fornoestro (ĉinstila pentraĵo)

Nova socialisma Tibeto en marŝo


La mizera kaj malpura Lasao nun portas novan veston.



Rimarkindajn fruktojn oni akiris en utiligado de lokaj akvoriĉfontoj. Jen estas Ĉabdo-elektrejo.



Antaŭ la Liberigo Tibeto havis preskaŭ neniun industrian, tamen nun havas industriojn de metalurgio, elektro, karbo, kemiaĵoj, maŝinoj, arbaro, ŝpinteksado kaj ledo. Jen draŝmaŝinoj kaj hidroturbinoj produktitaj de la Lasaa Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj "La 1-a de Julio" atendas transportadon.



Nova generacio de tibetanaj laboristoj kreskas. La foto montras ke tibetanaj kadroj kaj laboristoj kune puŝas ĉarojn.




Nun ŝosea reto kun Lasao kiel centro ludas gravan rolon en plifortigo de nacia unuiĝo kaj konstruado de la nova Tibeto. Jen la ŝoseo de Lasao ĝis Jadong.







Tibetana kadro de Hianfeng-komunumo, Gjacagubernio selektas tritikon kune kun komunumanoj.



Paŝtejo de Hongki-komunumo de Nakiugubernio





La agrikulturo de Tibeto akiris ĉijare bonan rikolton. Pengpo-kultivejo je 3,800 metroj super la marnivelo rikoltas tritikon.



En solidareco, diversnaciecaj popoloj kune konstruas novan socialisman Tibeton. Guo Huaking (hano), vicsekretario de la Nakiu-subregiona partia komitato kaj partia sekretario de Hongki-komunumo Duogi (tibetano) masonas ŝafstalon sur paŝtejo.


Tibetanaj lernantoj de la Lasaa Mezlernejo sin ekzercas pri mezurado.



Garnizono de ĈPLA en Tibeto patrolas tage kaj nokte por defendi la socialisman konstruadon de la landlima regiono.



Marŝas la nova socialisma Tibeto



LA 9-a de septembro de la kuranta jaro estis la deka datreveno de la fondiĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Kune kun la tibeta popolo, la diversnaciecaj popolanoj de Ĉinio varme celebris tiun brilan feston. La Centra Delegacio estrata de Hua Guofeng, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, flugis al Lasao por partopreni en la celebrado kaj transdonis al la popolo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono la varmajn gratulojn kaj korajn prizorgojn de la granda


gvidanto de ĉiuj naciecoj de Ĉinio Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. La Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro sendis gratulajn telegramojn al la Tibeta Aŭtonoma Regiono. La 9-an de sept. en la antikva urbo Lasao sur la altebenaĵo flirtis ruĝaj flagoj kaj laŭte bruis tamburado kaj tamtamado kaj la urbo dronis en atmosfero de ĝojo. Pli ol 50,000 popolanoj de diversaj naciecoj en Lasao okazigis solenan celebran mitingon. En la mitingo, la Centra Delegacio prezentis al respondeculoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono gratulan standardon kun jena surskribo en la tibeta kaj hana lingvoj: “La popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando unuiĝu kaj venke marŝu laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!” En la mitingo oni laŭtlegis salutajn telegramojn al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. En pluraj tagoj je tiu okazo la urboj, vilaĝoj kaj paŝtejoj de la aŭtonoma regiono estis en ĝoja festa atmosfero.


Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la miliono da tibetanaĵ servutuloj renversis la feŭdan servutan sistemon kaj gajnis la grandan venkon de la demokratia revolucio, kaj pli poste ili fondis la Tibetan Aŭtonoman Regionon en 1965 kaj per tio komencis tute novan paĝon en la historio de Tibeto. En la pasintaj 10 jaroj post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono

Hua Guofeng, estro de la centra delegacio, kaj Jen Song, Ngapo Ngauang-Gigme, respondeculoj de la Partio, registaro kaj armeo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono sur la podio



Nova ponto sur la rivero Jalucangpo





La 9-an de septembro, diversnaciecaj popolanoj de Lasao kunvenis por solene celebri la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

la tibeta popolo faris la Grandan Kulturajn Revolucion kaj la Movadon de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, persiste iris la socialisman vojon kaj klopodis por efektiviĝi la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ “Unuiĝu, progresu, disvolviĝu plie”. En la mallonga tempo de 10 jaroj, la tibeta popolo trapasis plurajn jarcentojn. Forpasis por ĉiam la plej reakcia, obskura, kruela kaj barbara feŭda servuta sistemo. Hodiaŭ, brila nova socialisma Tibeto alte staras ĉe la sudokcidenta landlimo de Ĉinio.

En la pasintaj dek jaroj, la tibeta popolo kritikis la kontraŭrevoluciajn reviziismajn liniojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, la naciperfidan klikon de Dalai kaj la reakciajn teokratiajn kaj determinisman, en la akra batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso disvastiĝis senprecedence kaj la socialisma konscio de la miliono da liberigitaj servutuloj multe altiĝis. En la agrikulturaj kaj brutobredaj distriktoj jam efektiviĝis popolkomunismo. La totala produktokvanto de greno

de la tuta aŭtonoma regiono en 1974 kreskis je 48% kompare kun tiu en 1965, kaj je 150% kompare kun tiu antaŭ la demokratia reformo en 1958, tiel ke la regiono jam havas sufiĉan grenon por sia bezono. La nuna totala nombro de ĝiaj brutoj kreskis je 130% kompare kun tiu en 1958. Rapide disvolviĝis ĝia industrio kaj nun ĝi jam havas pli ol 250 mezajn kaj malgrandajn industriajn entreprenojn. La nove konstruitaj ŝoseoj jam interligas 97% de ĝiaj gubernioj. Ankaŭ ĝiaj kultura, eduka kaj higiena aferoj multe disvolviĝis. 200,000 lernantoj nun lernas en ĝiaj superaj, mezaj kaj elementaj lernejoj kaj jam formiĝis reto de kuraca servo konforma al la bezono de la agrikulturaj kaj paŝtaj distriktoj. Senĉese pliboniĝas la vivo de la popolo kaj senĉese grandiĝas la nombro de la tibetanoj. Granda nombro da naciecaj kadroj kreskas kaj partoprenas en gvidantaroj de diversaj niveloj. La miliono da liberigitaj servutuloj vere stariĝis kaj fariĝis mastroj kaj la diktaturo de la proletaro pli kaj pli firmiĝis. Giganta ŝanĝo okazis al Tibeto kaj la vanaj klopodoj de la historiaj arlekenoj

kiel Dalai kaj iliaj mastroj por bari la antaŭenruliĝadon de la historia rado de Tibeto pruviĝis nura revo. Prave diris la tibeta popolo: “Nepermesebla estas restaŭro de la feŭda servuta sistemo kaj ni iros rezolute la brilan socialisman vojon.”

Tibeto estas neapartigebla parto de la teritorio de Ĉinio. Marŝas antaŭen Ĉinio, marŝas antaŭen ankaŭ la nova socialisma Tibeto. En la estonto, la diligenta kaj kuraĝa popolo de diversaj naciecoj de Tibeto, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, certe konstruos la novan socialisman Tibeton pli prospera kaj faros pli grandan kontribuon al la plifirmigo de la unuiĝo de ĉiuj naciecoj de Ĉinio, al la plifirmigo de la diktaturo de la proletaro kaj la plifirmigo de la nacidefendo.



La unua generacio de tibetanaĵ karboministoj

Paŝtistoj de Nagĉu-gubernio vendas lanon al aĉetejo.





Diversnaciecaj popolanoj de Lasao manifestacias por varme celebri la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

ANTAŬEN MARŜU, LASAO!

de GJU HINHUA

LASAO estas la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. La granda tibeta revolucio reunigis la antikvan urbon Lasao, kiu havas historion de pli ol 1,300 jaroj. Ascendinte altaĵon oni povas vidi, ke en la nuna valo de la Lasaa Rivero ĉie regas prospero. La lazura rivero preterfluas la urbon, la oraj tritikplantoj ondas en vento kaj inter densaj arboj vidiĝas vico post vico da novaj domoj. La loko antaŭe plena de koto sub Potala-palaco nun fariĝis movplena komerca kvartalo. La antaŭaj ĉifonaj tendoj sub la servuta sistemo nun estas anstataŭitaj de novaj fabriksdomoj. En la okcidenta kaj norda antaŭurboj de Lasao aperis

altaj fumtuboj neniam viditaj en la malnova Tibeto. La asfaltita ŝoseo kiu ligas malnovan kvartalon kaj la novan industrian kvartalon de la urbo estas ambaŭflanke borderita de arboj. Sur la ŝoseoj sin etendantaj de la urbo al diversaj lokoj navede kuras aŭtoj plensarĝitaj. La antikva kaj reuniginta Lasao nun staras kun vivplena kaj freŝe bela fizionomio sur la tegmento de la mondo.

Antaŭ la Liberiĝo, Lasao estis paradizo por la servutulmastroj kaj infero por la laboranta popolo. Sub la reakcia regado de la loka registaro, templo kaj nobelaro kun Dalai kiel la ĉefo Lasao fariĝis simbolo de malpureco,

postiĝinteco, barbereco kaj abomenindeco. Tiam ĉie sur la stratoj estis rubaĵoj kaj fetora akvo kaj sklavoj kun detranĉitaj piedoj aŭ brakoj rampis surtere almozpetante. En tiu tempo tie troviĝis nenia moderna urba konstruaĵo, tamen estis sufiĉe granda nombro da burokrataj institucioj de la tibeta reacia loka registaro kaj malliberejoj por servutuloj. En tiu urbo kun pli ol 30,000 loĝantoj koncentriĝis centoj da familioj de grandaj servutulmastroj kaj komercistoj kiuj servigis al si grandan nombron da sklavoj baraktantaj kun la Morto. Krome tie estis miloj da almozpetantoj kaj vagabondoj. La ekstrema putriĝo kaj akra antagonismo de klasoj evidente kondukis la malnovan Lasao al pereco, tio estas nerezistebla leĝo de la historia disvolviĝo!

Post la paca liberigo de Tibeto en 1951, granda ŝanĝiĝo okazis al Lasao, sekve de la likvido de la reacia arma ribelo*, demokratia reformo, fondiĝo de la aŭtonoma regiono kaj la Granda Proleta Kultura Revolucio. Antaŭe en ĝi estis nenia moderna industrio kaj eĉ ĝia malmulta metioproduktado trovis sin en agonio. Post la paca liberigo de Tibeto, por helpi la tibetan popolon en konstruado de ĝia hejmloko, la centra registaro konstruigis en ĝi nombron da objektoj. Tiam la reak-

cia tibeta loka registaro, por protekti sian malluman feŭdan servutan sistemon, ĉiamaniere malhelpis kaj subfosis la konstruadon. Ili diris, ke konstruado de ŝoseoj ofendis la "sanktan monton" kaj atencis la "dion" kaj ekspluatado de karbomino elfosis ilian "trezoron". Kun disvolviĝo de la tibeta revolucio la lasaa popolo, sub la subteno kaj helpo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro, frakasis ĉiujn intrigojn de la reaciaj regantoj. Ili hakis montojn por

En la bebo-ĉambro de la Popola Hospitalo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono



Tibetaj geknaboj en la Unua Elementa Lernejo de Lasao



fosi irigaciajn kanalojn kaj konstruis nombron da fabrikoj, lernejoj, magazenoj kaj kulturaj instalaĵoj venkinte multajn malfacilojn. Nun Lasao Jam disvolviĝis en industrian urbon kun certa skalo. La laboristoj konsistigas jam trionon de la tuta loĝantaro de la urbo kaj krome en ĝi loĝas preskaŭ 6,000 kooperativaj metiistoj. En la urbo kaj ĝiaj antaŭurboj konstruiĝis sume 30 fabrikoj de karbo, elektro, maŝinoj, konstruaj materialoj, malpeza industrio, kemia industrio kaj ŝpinteksado kaj krome ankaŭ funkcias aŭtaj kaj geologiaj prospektoraj grupoj. En la malnova Lasao eĉ alumeto kaj fera najlo devis esti importitaj de fremdaj landoj, kies varoj inundis ĝian merkaton. Nun la lasaaj laboristoj fabrikis per siaj manoj draŝmaŝinojn, grenventumilojn, elektrajn motorojn, maŝinpartojn de aŭto, sulfatan acidon, cementon kaj diversajn vivbezonaĵojn. Kiel granda estas la progreso de Lasao!

Sur la stratoj de la malnova Lasao ĉie videblis vagantaj senhejmaj laborantaj popolanoj. Nun tia tragika sceno jam malaperis por ĉiam. En la popola Lasao jam delonge ne estas senlaborulo. La loĝkvartalaj komitatoj en Bargor-strato kaj sub Potala-palaco funkciigis dekojn da metiaj kooperativoj inkluzive de feraĵoj, lignaĵoj, kudrado, sapo, lanaĵoj k.a. En la pasintaj pli ol dek jaroj 5-obliĝis la nombro de la metiistoj de la urbo. La lasaa agrikulturila fabriko "La Unua de Julio" antaŭe estis feraĵa kaj lignaĵa interhelpa grupo konsistanta el tri metiistoj. Ĝi iom post iom disvolviĝis unue en kooperativon kaj poste en ŝtatan fabrikon. En la pasinteco la forĝistoj estis rigardataj kiel "nigrostuloj" de la plej malsupera socitavolo. Nun ili manipulas modernajn ilmaŝinojn kaj fabrikas diversajn maŝinojn por subteni la agrikulturan produktadon.

Kun disvolviĝo de la moderna industrio kaj kooperativa metio multe pliboniĝis la materia kaj kultura vivo de la laboranta popolo de Lasao. Antaŭ la Liberiĝo tie estis nur du lernejoj funkciigataj de la reacia tibeta loka registaro por superaj lamaoj kaj nobeloj kaj unu kantodanca trupo de la loka

registaro, kiuj servis nur al la regantaj klasoj. Nun en Lasao troviĝas ne nur elementaj lernejoj kun preskaŭ dekmil lernantoj sed ankaŭ mezlernejoj kaj pedagogia kaj higiena kolegioj. Lastatempe oni starigis ankaŭ pedagogian instituton kaj du laboristajn universitatojn de "la 21-a de julio". 6 kulturaj kaj artaj trupoj inkluzive de kantodanca ensemblo kaj tibetopera trupo ofte faras prezentadon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La laboranta popolo ĝuas senpagan kuracadon. En la urbo fondiĝis ankaŭ sciencaj kaj esploraj institucioj de agronomio, brutobredado kaj veterinara arto, meteorologio, hidrologio kaj sismologio. Ankaŭ ĝia komerco havas grandan disvolviĝon. En 1974 la venda kvanto de vivbezonaĵoj plimultiĝis je 74% kompare kun tiu en la komenca periodo post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono kaj la prezo de te-briko, unu el la nemalhaveblaj vivbezonaĵoj de la tibeta popolo, malaltiĝis je 61.5%.

La diversnaciecaj laborantaj popolanoj konstruis la novan Lasaon per siaj manoj. La plankareo de la domoj de la tuta urbo konstruitaj post la Liberiĝo estas 10-oblo de tiu de la malnova Lasao, kaj la norda kvartalo de la urbo etendiĝis ĝis loko pli ol kvin kilometrojn fore. Antaŭvespere de la deka datreveno de la fondiĝo de la aŭtonoma regiono, nova asfalta vojo jam estis finkonstruita, nova telekomunika domo estos baldaŭ konstruita kaj termoelektra centralo estas en streĉa konstruado. La antikva Lasao impete galopas antaŭen kvazaŭ brava ĉevalo, ĝi plibeligas la Tibetan Altebenajn per sia ĉarmo kvazaŭ brilanta perlo sur la tegmento de la mondo.

** En la 10-a de marto 1959 la supera reacia kliko, reprezentanta la grandajn servutul-mastrojn en la antaŭa tibeta loka registaro, faris arman ribelon por perfidi la patrolandon sub instigo kaj subteno de la imperiismo kaj reacia kliko de Hindio. En la 19-a la ribelantoj faris ĝeneralan atakon al la trupoj de ĈPLA en Lasao. En la 20-a la trupoj de ĈPLA komencis fari rebaton laŭ ordono. Helpate de la tibeta popolo la trupoj subpremias la ribelon en la 22-a post dutaga batalo.*

Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio

En Urumĉi



En la longaj obskuraj jaroj de la malnova Ĉinio Hingiang dronis en malriĉeco, dezerteco kaj postĝinteco kaj la tiea popolo multe suferis de diversaj plagoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio komenciĝis tute nova paĝo en la historio de Hingiang.

Kiajn ŝanĝojn la revolucio havigis al Hingiang? Kiel statas la tieaj naciecoj kaj la socio? En tiu ĉi numero kaj la sekvanta ni prezentos al niaj legantoj kelkajn artikolojn kaj fotojn pri tio.

— La Red.

Okaze de la 26-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la 13 naciecoj de Hingiang de nia lando celebros ankaŭ la 20-an datrevenon de la naskiĝo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Hingiang en la nordokcidenta landlima regiono de Ĉinio estis liberigita en 1949, same kiel multaj aliaj provincoj. Poste, laŭ la nacieca politiko de la Komunista Partio de Ĉinio, ĝi praktikas naciecan regionan aŭtonomecon.

Hingiang estis nomata "Okcidenta Regiono" en antikva Ĉinio. Frue en la unua jarcento a. K. la ĉina dinastio Okcidenta Han jam instalas tie ŝtatajn instituciojn. Kaj ĉiuj postaj dinastioj senescepte fondis tie instituciojn por administrado kaj militaj aferoj. La

feraj historiaj faktoj kaj granda nombro da trovitaj historiaj kulturaj objektoj elokvente pruvis, ke Hingiang estas de antikveco, neapartigebla parto de Ĉinio.


Hingiang havas 13 naciecojn, nome ujgurojn, hanojn, kazaĥojn, ĥalĥazojn, siboojn, taĝikojn, rusojn, uzbekojn, tatarojn, dahu-rojn, huojn, mongolojn kaj manĉurojn. La nova Ĉinio praktikas politikon de egalrajteco inter ĉiuj naciecoj, ĉu granda aŭ malgranda, oponas kontraŭ grandnacia ŝovinismo kaj paroĥisma naciismo. En regionoj koncentre loĝataj de nacimalplimulto nia lando praktikas naciecan regionan aŭtonomecon por garantii veran politikan egalecon de naci-minoritatoj. La Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono estas unu el la kvin aŭtonomaj regionoj de naciminoritatoj de nia lando.



Hingiang havas 1,600,000 kvadratajn kilometrojn, nome sesonon de la tuta teritorio de Ĉinio. La loko estas tre riĉa kaj bela kaj havas multajn montarojn. En ĝia norda parto staras la montaro Altajo, en ĝiaj suda kaj sudokcidenta partoj la imponaj montaroj Kunlun kaj Karakorum kaj en ĝia okcidenta parto estas la Pamira Altebenajo, la “tegmento de la mondo”. Ĝia orienta parto estas relative ebena kaj kunligiĝas kun aliaj provincoj de la lando. Meze de la regiono estas la neĝkovrata montaro Tianŝan, kiu dividas la regionon en du partojn, nome nordan kaj sudan Hingiang, kun tute malsamaj naturaj pejzaĝoj. En la baseno Tarim sude de Tianŝan-montaro estas la plej granda dezerto Taklamakan. La baseno estas borderita de oazoj, kie troviĝas bonaj kampoj kaj fruktogardenoj. Norde de Tianŝan-montaro estas Ĝungar-baseno, kiu estas riĉa je petrolo. Ĉe ĝia okcidenta rando kuŝas la vasta Ili-a Kazaha Stepo kovrata de herba tapiŝo sur kiu sin paŝtas grasaj ŝafoj kaj ĉevaloj. Oriente de Tianŝan-montaro estas la plej malalta baseno Turfan, je 154 metroj sub la mara nivelo, kiu produktas Hami-melonon kaj senkernan vinberon. En la longaj kaj altaj montaroj de Hingiang estas densaj arbaroj,



kaŝiĝas sub la tero riĉaj mineraloj de karbo, fero kaj koloraj metaloj, kaj estas ankaŭ neĝamasoj kaj glaciriveroj, kiuj formas neelĉerpeblan fonton de irigacia akvo. En multaj grandaj kaj malgrandaj basenoj kaj montvaloj de Hingiang troviĝas ne nur vastaj virgaj terpecoj ekspluateblaj, sed ankaŭ oazoj ĉirkaŭataj de riveroj kaj sukoplenaj naturaj gresejoj.



La Hingiang-a Kemisterka Fabriko en antaŭurbo de Urumĉi

Sed antaŭ la Liberiĝo, same kiel la aliaj naciecoj de nia lando, la popolo de Hingiang estis terure subpremata kaj ekspluatata de imperiistoj kaj iliaj agentoj kuomintangaj reakciuloj kaj vivis en abismo de mizerego.

De la mezo de la 19-a jarcento ĝis la 20-a jarcento, imperiistoj de la cara Rusio devigis la ĉinan registaron subskribi serion da neegalrajtaj traktatoj, per kiuj ili proprigis al si grandan pecon da teritorio de nia Hingiang, akiris konsulan jurisdikcion, varan senimpostecon kaj aliajn agresivajn privilegiojn, forrabis agrikulturajn kaj brutajn produktaĵojn kaj atencis la popolon. Cetere la cara Rusio faris subfosojn en Hingiang kun la intenco aneksi ĝin.

Hodiaŭ la social-imperiismo heredis la robon de la malnovaj caroj kaj praktikas la politikon de agreso kaj ekspansio. Ĝi starigis grandnombrajn trupojn ĉe la landlimo, intence provokis armajn koliziojn sub diversaj

pretekstoj kun la revo efektiviĝi la ambiciaĉon kiun la malnovaj caroj ne sukcesis efektiviĝi.

Sed la leviĝinta ĉina popolo ne toleras ofendojn. Jam por ĉiam forpasis la tagoj, en kiuj imperiistoj povis laŭvole subpremi kaj sklavigi la ĉinan popolon. Subtenate de la tuta popolo la diversaj naciecoj de Hingiang estas konstruantaj kaj defendantaj la sanktan teritorion de la Patrio kun plena memfido.

Post la Liberiĝo la impeta disvolviĝo de la ekonomia konstruado de Hingiang novigas ĝian fizionomion tagon post tago. La diversnaciecaj popolanoj de Hingiang ekspluatas la riĉajn mineralojn kaj establis modernajn industriojn de ŝtalo, karbo, petrolo, elektro, neferaĵoj, maŝino, kemiaĵoj, ledo, tekstilado, sukerfarado k.a. Sur la dezerta Gobio aperis multaj novaj urboj, fabrikoj kaj minejoj. Hingiang produktas longfibran kotonon, sed antaŭe ĝi tute ne havis tekstilan industrion. Nun ĝi jam havas modernajn kotonajn tekstilajn fabrikojn kaj konstruis lanajn tekstilajn fabrikojn en paŝtaj areoj. En la Granda Proleta Kultura Revolucio la industrio de Hingiang havis novan disvolviĝon. Samtempe kun la disvolvo de grandaj industriaj entreprenoj, ankaŭ lokaj mezaj kaj malgrandaj industriaj entreprenoj estis vaste starigitaj. En la lastaj 10 jaroj Hingiang konstruis preskaŭ 500 mezajn kaj malgrandajn industriajn entreprenojn. Iom post iom altiĝas la memproviza nivelo de Hingiang je industriaĵoj kaj ĝi eĉ povas liveri superbezonaĵojn de iuj specoj, ekzemple petrolon, karbon, lanŝtofon, lanfadenon k.a. al aliaj lokoj. Ĉiuj naciecoj en ĝi nun havas siajn unuajn industriajn laboristojn devenintajn de kamparanoj kaj paŝtistoj.

Antaŭe la vasta Hingiang havis nur kameleojn kaj azenojn por transportado kaj duono de ĝiaj gubernioj ne havis ŝoseojn. Post la Liberiĝo, por ŝanĝi la postiĝintecon de trafikado, akceli la socialisman konstruadon, plifortigi la politikan, ekonomian kaj kulturen interrilatojn de Hingiang kun aliaj provincoj de la lando, la popolo de Hingiang, helpate de la ŝtato, konstruis en dezertoj kaj mon-

taroj ŝosean reton kun la ĉefurbo Urumĉi kiel la centro. Nun ĉiuj guberniaj urboj kaj la sidejoj de la popolaj komunumoj estas interligitaj de ŝoseoj kaj fervoja linio interligas Urumĉi kun Lanĝoŭ kaj Pekino. Pluraj aerlinioj kunligas Pekinon kun Urumĉi kaj aliaj gravaj urboj de Hingiang.

Liberigite el sub la regado de feŭda sistemo (en kelkaj lokoj eĉ de sklava sistemo) la agrikulturo kaj brutobredado de Hingiang estis disvolvita. Antaŭe en la agrikulturaj lokoj de Hingiang la bienuloj kaj kulakoj, kiuj konsistigis nur malpli ol 8 procentojn de la tuta loĝantaro, posedis 80% de la tuta agraro, dum la kamparanoj, la pli ol 90 procentoj de la tuta loĝantaro, havis nur la restantajn 20% de la agroj. La feŭdisma bienula klaso ekspluatis la kamparanojn per diversaj rimedoj. La malriĉaj kamparanoj eĉ ne havis monon por aĉeti simplajn agrikulturilojn kiel ŝpaton, kaj 4 familioj havis meznombro nur unu ŝpaton. Ankaŭ la malriĉaj

paŝtistoj estis kruele ekspluatataj de la brutoposedantoj. Post la Liberiĝo, la demokratia reformo kaj la socialisma reformo ĝisfunde likvidis ekspluaton kaj la fondiĝo de popola komunumo kondukis la kamparanojn kaj paŝtistojn sur la feliĉan socialisman vojon.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj la popolo de Hingiang energie konstruis irigaciajn sistemojn kaj transformis sablejojn por disvolvi agrikulturon. Tie en la ebenajoj la pluvkvanto estas tre malmulta kaj vaporado rapida, kaj plejparto de la kampoj devas esti irigaciataj per degelinta neĝo aŭ akvo de suraŭ sub-teraj riveroj. Apogante sin sur la kolektiva forto de popola komunumo, prenante Daĝaj kiel ekzemplon, la popolo de diversaj naciecoj de Hingiang reformis riverojn, konstruis multajn akvorezervejojn kaj irigaciajn kanalojn, fosis multajn maŝinputojn kaj subterajn kanalojn. Cetere la popolo kulturas forstojn por bari ventegon kaj sablomoviĝon. Dank' al tio malnovaj dezertoj

Diversnaciecaj paŝtistoj vendas lanon al ŝtata aĉetejo.





Rikolto de vinberoj en Turpan-gubernio

estis turnitaj en fekundajn kampojn. Plimul-tiĝo de agrikulturaj maŝinoj kaj disvastigo de progrese agrikultura tekniko pretigis favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de produktado. En tiu regiono rapide kreskas la produkto-kvanto de greno kaj kotono kaj multe progresis ankaŭ la produktado de silko kaj fruktoj.

En la vastaj regionoj de brutobredado la popolaj komunumoj konstruis multajn vilaĝojn kaj loĝpunktojn, dank' al kio paŝtaj nomadoj fiksloĝiĝis. Oni anstataŭigis la malnovan simplan paŝtadon per scienca maniero kaj starigis bazojn de furaĝo. Je la 7-a jaro post la Liberiĝo la nombro de brutoj de Hingiang jam superis la plej altan nombron en la historio. Cetere bonaj rasoj de brutoj estas senĉese elkulturataj. Multe grandiĝis la nombroj de la fama Ili-a ĉevalo de Hingiang taŭga kaj por tirado kaj por rajdado, kaj tiu de la purrasa ŝafo kun fajna lano kaj delikata viando. Hingiang fariĝis unu el la brutobredaj bazoj de Ĉinio.

En konstruado kaj defendado de la landlima regiono, la garnizonantaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj ĉiuj na-

ciecoj de la regiono kune faris gravan kontribuon. Ekde 1950, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ, la trupoj komencis ekspluati virgajn terojn en la dezertoj de Hingiang, establis multajn mekanikigitajn kultivejojn kaj produktis multe da greno kaj kotono.

La ŝtato multe investis en la ekonomia konstruado de Hingiang, fervore helpis ĝin per homfortoj, materialoj, tekniko, ekipaĵoj k.a. kaj multe favoris la lokon per speciala moderigo de prezoj de varoj. Krome ĉiujare la ŝtato subvencias Hingiang por disvolvi ĝiajn ekonomion, kulturon, edukadon, higienon kaj publikan servon de la nacimalplimulto.

Antaŭ la Liberiĝo Hingiang havis nur 1 superan lernejon kaj estis ege malfacile por la infanoj de laboruloj lerni tie. Nun ĝi jam havas 8 superajn lernejojn kaj multaj junuloj de nacimalplimulto studas en superaj lernejoj de Pekino, Ŝanhajo k.a. urboj. Post la Liberiĝo la ŝtato kulturis por Hingiang pli ol 15,000 diplomitojn de superaj lernejoj. Mezgradaj kaj elementaj lernejoj estas jam ĝene-

Taĝika infano kreskas en feliĉo.



rale starigitaj en la urboj kaj la kamparo. La nunaj nombroj de medicinaj laborantoj kaj malsanulaj litoj de hospitaloj estas 90-oblo kaj 50-oblo respektive de tiuj de 1949. Ne-longe post la Liberiĝo la ŝtato jam starigis en Hingiang multajn kuracejojn kaj sanitarejojn de infektaj kaj ripetemaj malsanoj, rapide forigis variolon, malarion k.s. malsanojn longe cirkulintajn en la historio. Nun kuracaj kaj higienaj institucioj dislokiĝas tra la tuta Hingiang. Ĉiuj popolaj komunumoj kaj preskaŭ ĉiuj produktaj brigadoj havas siajn proprajn sanitarejojn. Depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio la ŝtato senpage liveris al kuracejoj de 344 popolaj komunumoj de Hingiang kompletojn da kuracaj ekipaĵoj. Aperis granda nombro da kuracistoj de nacimalplimultoj. Kun la pliboniĝo de la kondiĉoj de kuraco kaj higieno kaj de la vivo, multe altiĝis la nivelo de la sano de la laboranta popolo kaj okulfrape multiĝis la nombro de la membroj de la naciecoj de Hingiang.

La disvolviĝo de la produkto kaj konstruado de Hingiang plibonigas tagon post tago la vivon de la diversnaciecaj popolanoj. Ili rigardas la jarojn antaŭ la Liberiĝo kiel inferon kaj komparas la hodiaŭan vivon kun dolĉa hami-melono.


La popoloj de la naciecoj de Hingiang havas siajn proprajn morojn kaj vivkutimojn kaj iuj kredas je islamo dum aliaj je lamaismo. Ili estas liberaj kredi aŭ ne kredi je religio. La religiaj temploj estas bone protektataj de la ŝtato.

Kune kun la popolo de la tuta lando, la diligenta, brava kaj saĝa popolo de diversaj naciecoj de Hingiang kreis la longan historion kaj la kulturon de Ĉinio, multfoje rezistis kontraŭ agresoj fremdlandaj, kaj defendis la teritorian integrecon de la patrio. Hodiaŭ en la granda familio de la patrio kun egalrajteco, unuiĝo kaj solidareco de la naciecoj, ili havas la eblecon plene disvolvi siajn grandajn fortojn por konstrui kaj defendi la novan, pli belan vivon socialisman.



Refoja riĉa rikolto de longfibra kotono en Hingiang

La tapiŝoj de Hetian-gubernio estas unu el la famaj metiartaĵoj de Hingiang



Popoloj de Hingiang, mastroj de la ŝtato

NUN la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang bonvenigas kun ĝojo la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj varme aklamas la grandajn venkojn akiritajn de ili mem kiel mastroj de la ŝtato kune kun aliaj popolanoj de la tuta lando en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado sub la saĝa gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ.

Hingiang kiel regiono loĝata de multaj naciecoj estas nedisigebla parto de la teritorio de la Ĉina Popola Respubliko. En la mal-

nova Ĉinio, pro kruela regado de imperiismo, feŭdismo, burokrata kapitalismo kaj reakciuloj interne de la naciecoj, la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang estis subpremataj en politiko kaj ekspluatataj en ekonomio. Ili deziregis renversi la reakcian regadon kaj akiri la politikan rajton esti mastroj de la ŝtato. Tiu longa dezirego realiĝis nur post kiam la revolucia milito de la ĉina popolo gajnis venkon tra la tuta lando en 1949.

Post la Liberigo, la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang sub la gvido de la Partio faris demokratian reformon, likvidis feŭdan



Membroj de la partia komitato de Akto-gubernio de Hingiang en lernado



Laboristinoj de kazaĥa, huja kaj hana naciecoj de la Iĵa Lana Tekstila Fabriko interŝanĝas sperton.

eksploatan sistemon kaj efektivigis naciecan regionan aŭtonomecon. Dum la lastaj pli ol 20 jaroj, ili, kiel mastroj de la ŝtato, konstruis kaj defendis la landliman regionon. La malriĉa kaj postiginta Hingiang rapide ŝanĝis sian fizionomion kaj nun la nova prospera socialisma Hingiang staras kiel giganto sur la nordokcidenta limo de nia lando.

La grandaj sukcesoj akiritaj en Hingiang estas brila venko de la politiko de la Komunista Partio de Ĉinio pri aŭtonomigo de nacieca regiono. Laŭ tiu politiko, en nedisigblaj partoj de la ĉina teritorio koncentre loĝataj de nacimalplimulto funkcias loka aŭtonoma regpotenco tenata de tieaj laboristoj, malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj kaj aliaj laborantaj popolanoj de la ĉefa nacieco kaj aliaj naciecoj, sub la unueca gvido de la

Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

Tiu politiko de la Komunista Partio de Ĉinio estis ellaborita laŭ la marksisma-leninisma teorio pri naciecaj problemoj konforme al la historiaj kondiĉoj kaj aktuala stato de la ĉinaj naciecoj, kaj ĝi estas nia fundamenta politiko por solvi la naciecajn problemojn. Laŭ marksismo-leninismo, efektivigo de egaleca unuiĝo de diversaj naciecoj estas fundamenta principo de la proleta partio por solvi naciecajn problemojn. En nia lando, efektivigo de nacieca regiona aŭtonomeco estas neevitebla tendenco en la historia disvolvigo. De antikveco, Ĉinio estas unuiĝa lando kun multaj naciecoj. La diversaj popoloj de Hingiang harmonie vivas kune kun aliaj popoloj de nia lando, kune kreis la longan historion kaj kulturon de la ĉina na-

cio. Precipe en batalado kontraŭ imperiismo en la lasta jarcento la komuna sorto strikte kunligis ilin. En la longa revolucia batalado, ili komprenis, ke nur aŭtonomeco de la naciecaj regionoj povas efektiviĝi egalecan unuiĝon de ĉiuj naciecoj, persisti en unuiĝo de la patrolando kaj atingi komunan prosperiĝon kaj disvolviĝon de ĉiuj naciecoj. Post la naskiĝo de la nova Ĉinio, la bazo de la feŭdisma regado estis detruita kaj la sistemo de nacieca subpremado estis likvidita, kaj ĉio ĉi tio pretiĝis kondiĉojn por efektiviĝi aŭtonomecon de naciecaj regionoj. Tiu aŭtonoma rajto ĝuata de niaj nacimalplimulto estas skribita en la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko.

Laŭ tiu politiko de nia Partio, post la venko de la demokratia reformo, en Hingiang stariĝis ekde la jaro 1953 unu post alia mon-

gola, huja, taĝika, siboa kaj du kazaĥaj aŭtonomaj gubernioj kaj kazaĥa, huja, ĥalĥaza kaj du mongolaj aŭtonomaj subregionoj, kaj en la 1-a de oktobro de 1955 stariĝis la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. En tiuj aŭtonomaj lokoj stariĝis kaj kompletiĝis sistemo de popola kongreso kaj okazis sinsekve popolaj kongresoj, kiuj diskutis kaj decidis multajn gravajn problemojn en politiko, ekonomio kaj kulturo de la lokoj kaj plenumis la aŭtonoman rajton de administrado de lokaj aferoj. Tre granda parto de la reprezentantoj de la diversnivelaj popolaj kongresoj estis el nacimalplimulto. Ekzemple, pli ol 90% de la pli ol 60,000 reprezentantoj de la duaj diversnivelaj popolaj kongresoj de la aŭtonoma regiono estis el nacimalplimulto.

La aŭtonomaj organoj de niaj lokoj de nacieca aŭtonomeco estas ŝtataj organoj en

Ainura Apiz (la meza), ujgura sekretariino de komunuma partia komitato konsultas veteranan kamparon.



tiuj lokoj. La aŭtonoma organo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono ne nur havas ĝeneralan rajton kiel aliaj ŝtataj organoj sed ankaŭ ĝuas aŭtonoman rajton difinitan de la konstitucio, nome administri internajn aferojn de sia nacieco, kulturi kaj enoficigi kadrojn el nacimalplimulto, uzi kaj disvolvi lingvojn de nacimalplimulto, apliki taŭgajn rimedojn kaj paŝojn por fari socialan reformon laŭ konkreta stato de la diversaj lokoj kaj la volo de diversaj popoloj, ellabori socialisman planon por ekonomia konstruado de la aŭtonoma regiono laŭ la unueca plano de la ŝtato, disvolvi lokan ekonomian konstruadon de aŭtonoma regiono kaj kulturan, edukon, sciencan, teknikan kaj higienan aferojn de diversaj naciecoj, administri financon de aŭtonoma regiono laŭ leĝo, ktp. La efektiviĝo de la aŭtonomeco de naciecaj regionoj plene mobilizis la socialisman aktivecon de diversnaciecaj popolanoj, plifortigis ilian solidarecon kaj la unuiĝon de la patrolando, akcelis la disvolviĝon de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado de Hingiang kaj defendis la nordokcidentan landlimon de la patrolando.

Kune kun aliaj frataj popoloj, la diversaj popoloj de Hingiang kun egalaj rajtoj kaj en egala pozicio aktive partoprenas en administrado de partiaj kaj ŝtataj aferoj. En la Deko Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, tri ujguraj kaj unu kazaha reprezentantoj de Hingiang estis elektitaj kiel membroj kaj alternaj membroj de la Centra Komitato de KPCĈ, inter kiuj unu kamarado estis elektita kiel alterna membro de la Politika Buroo de CK de KPCĈ. Same tiel estis en la Tutlanda Popola Kongreso, la plej alta regpotenca organo de la ŝtato. Ekzemple, el la 53 reprezentantoj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kiuj ĉeestis la Kvaran Tutlandan Popolan Kongreson en 1975, 40 estis reprezentantoj de diversaj nacimalplimulto. Inter ili du ujguraj kaj unu kazaha reprezentanto estis elektitaj kiel membroj kaj alia ujgura reprezentanto kiel vicprezidanto de ĝia konstanta komitato.




Kjum (la dua de maldekstre), laboristo de la petrolkampo de Karamaj kaj reprezentanto al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso en amaso

Frue en la jaro 1949, Prezidanto Maŭ jam montris: **“Estas neeble ĝisfunde solvi naciecan problemon kaj komplete izoli naciecajn reakciulojn, sen granda nombro da komunismaj kadroj devenintaj de nacimalplimulto.”** Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, la diversnivela partiaj organizoj de la aŭtonoma regiono kulturis kaj elektis grandan nombron da kadroj el nacimalplimulto tra praktiko de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Tio havas decidigan signifon por praktiki la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj efektiviĝi la partian poli-

tikon pri aŭtonomeco de nacieca regiono. Por senĉese altigi iliajn politikan konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj kaj ilian laboran kapablon, la Partio kaj la ŝtato starigis por ili diversajn kursojn kaj kadrajn lernejojn kaj sendis elektitojn el ili al altaj lernejoj, institutoj, la Alta Centra Partia Lernejo kaj Centra Instituto por Nacimalplimultoj por studado. Kaj mi, filo de malriĉa ujugra kamparano, estis elektita kiel membro de la Centra Komitato de KPĈ, kaj laboras kiel unu el la partiaj kaj registaraj respondeculoj de la Hingiang-a Ujugra Aŭtonoma Regiono. Ĉion ĉi tion mi ŝuldas al la edukado kaj kulturado de la Partio.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, Hingiang havis nur tri mil nacimalplimultajn kadrojn, kaj ĝis 1965, la nombro de ili

Kluzo nove konstruita sur Tarim-rivero



je pli-ol-30-oblo plimultiĝis dank' al la hardado en la demokratia reformo, socialisma reformo k.a. politikaj movadoj. De post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la vicaro de nacimalplimultaj kadroj kreskis je 24 procentoj kompare kun tiu de 1965, inter kiuj estas ankaŭ granda nombro da virinoj, junuloj kaj diversfakaj teknikistoj. Nun ĉiuj nacimalplimultoj de la aŭtonoma regiono inkluzive de tiuj kun tre malmultaj membroj havas siajn gvidantojn sur la vojo al socialismo. Tiuj nacimalplimultaj kadroj plejparte devenis de malriĉaj kamparanaj aŭ paŝtistaj familioj, aŭ ili mem estis jardungitoj kaj paŝtistoj suferantaj de kruela subprezado kaj ekspluatado de bienuloj kaj brutoposedantoj en la pasinteco. Pro tio, ili senlime amas la Partion kaj Prezidanton Maŭ kaj senŝanceliĝe iras la socialisman vojon. Sub la kulturado kaj eduko de la Partio, iliaj politika konscio kaj laborkapablo multe altiĝis, kaj samtempe ili bone konas sian naciecon kaj havas intiman rilaton kun la samnaciecaj amasoj, dank' al kio ili ludas gravan rolon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Kazaĥa junulino Samalkan el malriĉa paŝtista familio estas unu el multaj junaj kadroj aperintaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ pri kombiniĝo de revoluciaj junuloj kun laboristoj kaj kamparanoj, ŝi revenis al sia hejmloko por partopreni tie en fizika laboro post sia diplomiĝo el lernejo en 1965. Ŝi modeste lernis bonajn pensojn kaj bonan laborstilon de paŝtistoj kiuj amas kolektivon kaj fizikan laboron, peneme sin hardis kaj rapide progresis. Poste ŝi estis elektita kiel membro de la komunuma partia komitato, membro de la konstanta komitato de la gubernia partia komitato, vicestro de la subregiona revolucia komitato kaj membro de la partia komitato de la aŭtonoma regiono. Kiel kadro, Samalkan estas kaj gvidanto de revolucio kaj produktado, kaj ordinara laboranto. En konstruado de paŝta bazo, ŝi donis

bonan ekzemplon en konstruado de loĝdomoj de paŝtistoj, staloj kaj herbejo. Ŝi estis plurfoje elektita kiel avangarda laboranto. En 1975, ŝi ĉeestis la Kvaran Tutlandan Popolan Kongreson kaj estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la nomita kongreso. La rapida kreskado de Samalkan ĝojigis la paŝtistojn kaj ili diris: “Samalkan estas bona kadro kulturita de la Partio sur la stepo.”

Kamarado Talipdaut, vicestro de la revolucia komitato de Kaŝgar-subregiono, estas elstara ujugura kadro. En sia infaneco, li vivis en mizero. Post la Liberiĝo, li avide studis verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ por mastri revolucion teorion kaj decidis firme fari revolucion sekvante Prezidanton Maŭ. Li antaŭe estis partifilia sekretario de la tria brigado de Baŭzihong de Jengisar-gubernio. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, li aktive organizis teorian studrondon de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj por studi marksismon, profunde kritiki la krimegojn de Lin Biaŭ, kiu

vane intencis restaŭri kapitalismon en Ĉinio laŭ la absurda doktrino de Konfucio, kaj persisti en irado de la socialisma vojo. Baŭzihong estis loko multe plagita kun malalta produktokvanto en la historio. Post la Liberiĝo, ĝia fizionomio komencis ŝanĝiĝi. Por komplete reformi ĝiajn naturajn kondiĉojn, Talipdaut kaj aliaj kadroj mobilizis la komunumanojn por disvolvi la movadon de “lerno de Daĝaj en agrikulturo”. Ili fosis multajn irigaciajn kanalojn, ebenigis kampojn kaj konstruis forstozonon, tiel ke tiu brigado akiris riĉajn rikoltojn de grenoj kaj kotono en sinsekvaj jaroj. La antaŭa malriĉa kaj postĝinta Baŭzihong fariĝis nova prospera socialisma vilaĝo. Fariĝinte kadro, Talipdaut estis plurfoje honorita kiel modela kadro, elektita kiel popola reprezentanto de la aŭtonoma regiono kaj vidis Prezidanton Maŭ en Pekino.

En la pasintaj pli ol dudek jaroj, la hanaj kadroj laborantaj en Hingiang modele praktikis la naciecan politikon de la Partio, intime kaj solidare kunlaboris kun lokaj diversnaciecaj kadroj en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado, kaj faris kontribuon

Ujugura komunumano Saiti Tohti estis dungito de bienulo antaŭ la Liberiĝo. Hodiaŭ lia familio vivas feliĉe.



por plifirmigi la revolucian unuiĝon de la diversnaciecaj popolanoj, konstrui kaj defendi la limregionon de Ĉinio. Nuntempe, inter la diversnaciecaj popolanoj sude kaj norde de Tianŝan-montaro vigle disvolviĝas la movado de lerno de Du Hongliang, modela komunisto kaj hana kuracisto. Kamarado Du venis de sia hejmloko Liaŭning-provinco al Pamiro en la limregiono. Dum la lastaj kelkaj jaroj, li transgrimpis montojn malgraŭ laciĝo por fari kuracadon al nacimalplimultaj popolanoj ĝis li oferis sian vivon, kaj per tio li skribis komunisman triumfan kanton pri la solidareco kaj amikeco inter la naciecoj. Prenante lin kiel ekzemplon, la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang decidis fari novan kontribuon por senĉese plifirmigi la solidarecon de niaj naciecoj, plifortigi unuiĝon de la patrolando, konstrui kaj defendi la limregionon.

Retrorigardante la batalan historion de la dudek jaroj post la fondiĝo de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, mi povas diri senfanfarone, ke la politiko de nia Partio pri aŭtonomeco de naciecaj regionoj jam profunde radikiĝis en la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang. Ĝiaj potenca vivipovo kaj granda avantaĝo jam portis al ni viglan disvolviĝon de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado de Hingiang, kaj certe alportos al la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang ankoraŭ pli brilan kaj belan morgaŭon!



La prospera

LA vasta Kunes-stepo situas en Hinjuan-gubernio de la nordokcidenta parto de nia Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj ricevis sian nomon pro Kunes-rivero kiu fluas tra ĝi. Tie fekundas la grundo, abundas akvo kaj herboj kaj estas la hejmloko de la famaj Hingiang-a fajnlana ŝafo kaj Ili-a ĉevalo. En la fino de somero kaj la komenco de aŭtuno de la kuranta jaro ni vizitis kelkajn popolajn komunumojn de la stepo. Tiam estis ĝuste la ora sezono de la stepo kaj ĉie vidiĝis ĝojindaj scenoj de riĉaj rikoltoj de brutoj kaj grenoj. Aparte profundan impreson donis al ni la strebado de tieaj kazaĥaj kaj alinaciecaj kamparanoj kaj paŝtistoj en unuanima klopodado por konstrui socialisman novan stepon.

MARŜO SUR LA SOCIALISMA VOJO

Veturinte orienten de Jining urbo ĉe nia nordokcidenta landlimo je 150 kilometroj, nia aŭto eniris en la fekundan Kunes-stepon. Baŭŝak, kazaĥa kadro kiu akompanis nin, entuziasme rakontis al ni la okazaĵojn sur la stepo en la lasta tempo.

Li diris ke ĉi-jare estis la 20-a datreveno de la fondiĝo de la unua paŝta kooperativo de la stepo — la Lastaj-a Paŝta Kooperativo de Hinjuan-gubernio. Je la unua de junio, la Dongfeng-a Komunumo, al kiu apartenas la


Kunes-stepo

de *jurnalistoj de E.P.Ĉ.*

Lastaj-a Paŝta Kooperativo, okazigis memorigan mitingon kun partopreno de dekmil homoj por festi la akiritan venkon en la socialisma konstruado de la stepo en la pasintaj 20 jaroj. Li kun ekscitiĝo diris: “Tiu tago plenis je ĝojo kaj movoj. La mitingon ĉeestis ĉiuj gvidaj kadroj de Hinjuan-gubernio kaj la Ilia Kazaha Aŭtonoma Subprovinco. En la kunveno oni prezentis kantojn, dancojn, ĉevalrajdan konkurson kaj aliajn aktivadojn ŝatatajn de ni kazaĥoj.” Kiam nia

aŭto trapasis la Dongfeng-an Komunumon, Baŭŝak proponis ke ni vizitu la komunumon.

Sur herbejo ĉe montpiedo apud rivero, ni vizitis Manap, vicsekretario de la brigada partia filio, kiu antaŭe estis estro de la Lastaj-a Paŝta Kooperativo. En sia felta jurto, la mastro entuziasme akceptis nin, donis al ni dolĉan ĉevalinan lakton kaj regalas nin per lakta teo. Kaj ni libere interbabilis ĝuante la bongustaĵon.



Safaro de komunumo Ŝijue

Manap jam havas pli ol 70 jarojn. Li resumis sian vivon per la vorto "Multe suferinte en la pasinteco nun mi vivas en feliĉo". En la malnova socio, Manap laboris ĉe sep riĉuloj kiel jardungito dum 35 jaroj kaj vivis pli mizere ol ŝarĝbruto. Li diris: "Tiam sur la vasta stepo ne troviĝis eĉ unu herbo de ni malriĉuloj, kaj neniuj haroj de la grandaj gregoj apartenis al ni malriĉuloj. Tiam inter la popolanoj cirkulis la diro ke la malriĉuloj ekvivis feliĉe, kiam alaŭdo metos ovon sur la korpon de ŝafo. Kiel ni sopiris la alvenon de tia tempo!"

En la jaro 1949, la vastaj amasoj de malriĉaj paŝtistoj kun ekscitita koro bonvenigis la Liberiĝon de la stepo. Sub la helpo de la Partio, Manap altigis sian klasan konscion kaj fariĝis aktivulo en diversaj laboroj kaj produktado. Responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ pri organiziĝo por disvolvo de produktado, li kaj aliaj sep familioj de malriĉaj paŝtistoj starigis la unuan interhelpan paŝtan grupon sur la stepo en 1952. Ilia ago ricevis varmajn kuraĝigon kaj subtenon de la Partio kaj la popola registaro. La interhelpa grupo gajnis unu post alia riĉajn rikoltojn. En la jaro 1955, kiam la interhelpa grupo jam grandiĝis ĝis la amplekso de 23 familioj, ili proklamis la starigon de la Lastaj-a Paŝta Kooperativo. Manap estis elektita kiel ĝia estro.

La socialisma venko teruris la reakciajn brutoposedantojn kaj ili diris inter amasoj: "Sablo neniam povas ŝanĝiĝi en ŝtonon, kiom ajn multe da ĝi estas; el sklavoj neniam povas fariĝi ĉefo, kiom ajn multe da ili estas. Manap ne povos longe estri!" Manap kaj aliaj kooperativanoj rebatis la provokon de la malamiko. Sub la helpo de la partia organizo, ili racie aranĝis la produktadon, ne nur bone bredis brutojn, sed ankaŭ faris akvoutiligan konstruadon, vastigis la agraron kaj gajnis riĉajn rikoltojn de agrikulturo kaj brutobredado. En printempo de 1957, la paŝta kooperativo jam ampleksis 53 familiojn, ĝiaj brutoj multiĝis de 500 ĝis pli ol 3,000. En vintro de tiu jaro, ili konstruis multajn stalojn, aĉetis herbofalan maŝinon, tritikori-

koltan maŝinon, semmaŝinon kaj aliajn 12 agrikulturajn instrumentojn kaj buterapartigilon, kaj krome ili ankaŭ aĉetis Hingiang-ajn fajnlajnajn semsafojn, semĉevalojn kaj sembovojn, per kiuj ili firmigis kaj disvolvis la kolektivajn ekonomiojn.

La disvolviĝo de la paŝta kooperativo kun Manap kiel la estro montris superecon de socialisma kolektivigo kaj edukis la amasojn de paŝtistoj. Ekde la jaro 1956, en la regiono de Lastaj fondiĝis unuj post aliaj 14 paŝtaj kooperativoj. Kaj en 1958, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ, ili starigis la Nalat-an Popolan Komunumon, kiu estas nun nomata la Dongfeng-a Popola Komunumo.

Sur Kunes-stepo, ni vizitis ankaŭ la popolajn komunumojn Honghing, Kiangin kaj Ŝijue, kaj vidis multajn avangardajn personojn similajn al Manap. Sub la gvido de ili, vastaj amasoj de kamparanoj kaj paŝtistoj senĉese antaŭen marŝas laŭ la socialisma vojo.

STEPANOJ LERNAS DE DAĜAJ

Post la komunumigo, Kunes-stepo fariĝis ne nur prospera paŝtregiono, sed ankaŭ produkto de greno. Antaŭ la Liberiĝo, tie apenaŭ produktiĝis greno kaj grandaj terpecoj restis dezertaj. Post la Liberiĝo, precipe post la fondiĝo de la popolaj komunumoj, oni disvolvis amasan movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj tie iom post iom disvolviĝis la agrikulturo kaj brutobredado. Nun, la popolaj komunumoj de la stepo ĉiuj jam havas superfluan grenon krom memprovizo, ili disvolvas brutobredadon per agrikulturo, kaj iliaj agrikulturo kaj brutobredado akcelas unu la alian.

La Honghing-a Popola Komunumo estas bona ekzemplo de lerno de Daĝaj kaj disvolvo de agrikulturo kaj brutobredado sur la stepo, en kiu aperis multaj modelaj personoj. Unu el ili estas Anivarbek, paŝtisto de la kvina brigado. Tiu brigado havas vintran herbejon kun multaj ŝtonoj kaj maldensaj



herboj, kiu povis nutri nur malgrandan nombron da brutoj. Dum paŝtado Anivarbek forigis la ŝtonojn kaj utiligante tiujn ŝtonojn konstruis loĝdomojn por paŝtistoj, konservejon kaj stalojn, kaj krome ankaŭ lernoĉambrojn por la lernejo. Post la reformo verdaj herboj prosperas sur ĝi, kaj ĝi povas vivteni rimarkeble pli multe da brutoj. Same kiel Anivarbek, la komunumanoj de ĉiuj agrikulturaj grupoj de la komunumo faris kontribuon por pliprodukto. Ni vizitis la trian produktan taĉmenton de la tria produkta brigado de la komunumo kaj vidis ebenan kampon konstruitan de ĝi. Tie antaŭe estis pli ol 20 teramasegoj, inter kiuj estis malgrandaj terpecoj apartigitaj de longaj fosoj kaj nekultureblaj per maŝinoj, kies hektara produktokvanto estis tre malalta. Sub la gvido de siaj kazaĥa kaj hana taĉmentestroj, la komunumanoj de la taĉmento unuanime bataladis kvar vintrojn kaj printempojn, ebenigis ĉiujn teramasojn kaj konstruis 50 hektarojn da maŝinkultureblaj kampoj. Krome ili plenigis marĉon kun fragmitoj kaj per tio vastigis

siajn kampojn je 27 hektaroj. Dank' al tio la hektara produktokvanto de greno plimultiĝis sesoble. La produkta taĉmento fariĝis avangarda kolektivo de la komunumo en lerno de Daĝaj. En la lastaj jaroj, la komunumo energie faris agrikulturan akvoutiligan fundamentan konstruadon, plibonigis la irigaciadon al 2,700 hektaroj da kampoj kaj plivastigis siajn kampojn je pli ol 330 hektaroj. Dank' al tio la totala produktokvanto de greno multiĝis je 5-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo post la komunumigo. Nun ĉiuj agrikulturaj taĉmentoj de la komunumo ĉiujare ne nur provizas la paŝtajn taĉmentojn per 2,000 tunoj da grenoj, sed ankaŭ subtenas ilin per vintra fojno por 14,000 brutoj kaj la paŝtaj taĉmentoj ĉiujare subtenas la agrikulturajn taĉmentojn per 40,000 tunoj da organika sterko krom provizado al ili per plugbovoj, viandbrutoj kaj butero.

Depost la fondiĝo de la popola komunumo la agrikulturo kaj brutobredado de la tuta Kunes-stepo disvolviĝis sufiĉe rapide. Antaŭ la komunumigo, la greno produktita de Hin-



juan-gubernio ne sufiĉis por plenumi ĝian bezonon, nun ĉiu komunumano ĉiujare povas produkti meznombro pli ol 500 kilogramojn da greno. Krom rezervo de sufiĉa greno por sia konsumo, ili ĉiujare povas liveri 20,000 tunojn da grenoj al la ŝtato. La nombro de brutoj de la tuta gubernio en la fino de la lasta jaro estis pli ol 2-oblo de tiu antaŭ la komunumigo.

ALIĜIS LA MONDO

“Ĉar la suno brilas sur la ĉielo, ruĝaj floroj sur la stepo pompas en prospero; dank’ al gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, la kazaĥa popolo eblis veni el infero en paradizon.” La kazaĥoj ĉiuj lertas en kantado. Dum nia migrado tra la tuta stepo ni aŭdis multajn tiajn belajn kantojn. Neforgeseblaj por ni estas la kazaĥaj maljunuloj laŭte kantantaj sian novan vivon kun dombrao en la manoj.

En la obskura malnova socio, ili ofte kantis triste akompanate de ĝemantaj kordoj por

esprimi sian malkontenton pri la vivo. Hodiaŭ iliaj klaraj kaj sonoraj kantoj montras ilian laŭdon al la nova vivo.

Sur la somera paŝtejo de la komunumo Ŝijue, ni renkontis tre gastaman maljunan paŝtiston Gianglis. Li bonhumore rakontis al ni tian ŝanĝigon de la stepo, por ke ankaŭ la malproksimaj gastoj ĝuu lian ĝojon.

Li jam estas preskaŭ 60-jara, tamen ankoraŭ tre fortika. Li naskiĝis en familio de malriĉa paŝtisto. De la tago kiam li komencis havi memoron, lia patro laboris ĉe bienulo kiel jardungito. Kiam li havis 9 jarojn, li devis paŝti ŝafojn por brutoposedanto por akiri vivrimedon. Tiam ili ŝtopis sian stomakon per putra brano, ŝirmis sian korpon per ĉifona ŝafofelo, kaj la tuta familio havis nenion krom ĉifona tendo. Post la Liberiĝo, li fariĝis mastro de la stepo same kiel la aliaj malriĉaj paŝtistoj. Nun lia familio kun sep membroj ĉiujare ricevas el la produkta taĉmento pli ol 1,000 juanojn post pago de la manĝaĵoj. Ili ne nur havas novan feltan jurton, sed ankaŭ konstruis vastan loĝdomon sur la vintra-printempa paŝtejo. En lia domo

troviĝas stebmaŝino, radioricevilo kaj aliaj vivbezonaĵoj.

Ju pli bona fariĝis la vivo, des pli energie laboras Gianglis, kiu firme tenas en la koro la mizeron de la pasinteco. Sur la muro de lia felta jurto pendas ruĝa flago kun jena surskribo: "Honoro al la avangarda laboranto de brutobredado". Tio estis donacita de la partia komitato de la komunumo al li antaŭ 15 jaroj por laŭdi lian revolucionan spiriton. Tiam li paŝtis Hingiang-ajn fajnlajnajn ŝafojn kaj atingis eminentan sukceson de 139-pocenta generado de ŝafidoj en la komunumo. Depost tiam, Gianglis restas ĉiam la plej bona bredisto de ŝafaro.

Adiaŭinte Gianglis, ni veturis antaŭen laŭ Kunes-rivero kaj antaŭ niaj okuloj aperis unu post alia belaj scenoj: Sur ambaŭ bordoj de la rivero, forstozonoj etendiĝas en ĉiujn direktojn, kombajnoj brue rikoltas tritikon kaj kamionoj galopas sur ŝoseo inter kampoj. Tra la forstozono, ni rigardis malproksimen kaj vidis smeraldan herbejon kun vicoj post vicoj da blankaj paŝtistaj loĝdomoj kaj staloj tie kaj ĉi tie. Aparte okulfrapaj estis la ordaj

vicoj de domoj sur la stepo. Baŭŝak diris al ni, ke tie estas loĝpunkto de la komunumo konstruita post la Liberiĝo. En la malnova socio, la malriĉaj paŝtistoj vivis nomade, kaj tie estis neniu loĝanto. Post la Liberiĝo, sub la helpo de la Komunista Partio kaj la popola registaro, la vastaj amasoj de paŝtistoj disvolvis produktadon, konstruis la stepon kaj komencis fiksloĝi sur la bordoj de la rivero. Poste ili pene konstruis bazlokon de agrikulturo kaj paŝtado, kaj belaj novaj vilaĝoj aperis ĉi tie. Nun, ne nur la komunumoj ĉiuj havas lernejojn, hospitalon, aĉetajn kaj vendajn kooperativojn, brutokuracejojn kaj traktorajn stacion, sed ankaŭ produktaj brigadoj ĉiuj havas kuracejon, elementan lernejon kaj butikon. La maljunaj paŝtistoj, kiuj multe suferis en la malnova socio turmenton de malsato kaj malsanoj kaj ne havis ŝancon viziti lernejon, diris emocie: "La nova kaj malnova socioj estas tute malsamaj; la mondo tute ŝanĝiĝis!"

Kvankam ni jam estas for de la aminda stepo, tamen ĝiaj prosperaj scenoj profunde gravuriĝis en nian cerbon kaj sonoraj kantoj de kazaĥoj ankoraŭ ŝvebas ĉe niaj oreloj.



*Gianglis helpas
sian filineton en
lernado.*

NIUTOŬ, VILAĜO DE HEROJ

LA vilaĝo Niutoŭ situas apud la lago Gjudian, en la nordokcidenta parto de Ŝou-guang-gubernio, Ŝandong-provinco. Antaŭ pli ol 30 jaroj ĝi estis unu el la bazoj de kontraŭjapanaj armitaj fortoj en norda Ŝandong. En la militaj jaroj la popolo de la vilaĝo brave batalis sekvante unu alian kaj faris multajn prikantindajn heroaĵojn. Tiam 730 el la gejunuloj de la vilaĝo militservis en la popola armeo kaj 128 vilaĝanoj oferis sian vivon por la revolucio, kaj pro tio la vilaĝo estis honore nomata "Vilaĝo de Heroj".

ĈIAM MEMORI LA REVOLUCIAN TRADICION

La vilaĝanoj de Niutoŭ ofte parolas pri la aferoj en la militaj jaroj. En 1937 la Kompartio starigis en la vilaĝo kontraŭjapanajn armitajn fortojn kaj ĉiuj vilaĝanoj sen distingo de aĝo kaj sekso aktive partoprenis en la batalado kontraŭ la japanaj agresantoj. La edzinoj admonis siajn edzojn, la gepatroj kuraĝigis siajn gefilojn soldatiĝi. La virinoj faradis militistajn uniformojn kaj ŝuojn kaj flegis vunditajn armeanojn. La infanoj de la Geknaba Ligo gardostaradis aŭ komunikis informojn. Milicanoj detruis vojojn kaj pontojn de la malamikoj kaj atakis malamikojn helpe al la ĉefaj trupoj. La vilaĝo defendis la stabon de la Bohaj-a Milita Regiono kaj la Gubernian Komitaton de la Partio instalitajn en la Vilaĝo. Tiam la arsenalo, la vestaĵa fabriko kaj la hospitalo de la milita regiono troviĝis en fragmitejo de la lago Gjudian. Foje japanaj agresantoj intencis dronigi la vilaĝon en sangon. Ricevinte ordonon de supera instanco, la memdefenda regimento de

la milicanoj tuj helpis la amasojn evakuiĝi, kaj ĝia estro kamarado Ma Panhiang kun aliaj milicanoj sub sia gvido embuskis sude de la vilaĝo. Frue en la sekvanta mateno la malamikoj sin jetis al la vilaĝo. Trovinte neniun en la vilaĝo, ili ekrabis kaj bruligis la domojn. Poste ili forlasis la vilaĝon eskortante 5 ĉarojn plensarĝitajn per rabitaj objektoj. Sed sude de la vilaĝo ili estis draste punitaj de la embuskantaj milicanoj kaj armitaj fortoj de la gubernio kaj panike forkuris. En la 8 jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito la malamikoj atakis la vilaĝon 77 fojojn, sed la heroa vilaĝo staris nefleksebla.

En la Liberiga Milito, por konduki la revolucion ĝis la fino, la popolo de la vilaĝo organizis sin en brankardan kompanion kaj partoprenis en multaj bataloj norde kaj sude en la lando sekvante la ĉefajn trupojn kaj faris multajn meritojn. Pro tio la Kompanio estis glorita de la Stabo de la Tria Kampa Armeo per la titolo "Ŝtala Brankarda Kompanio de Ĉen Ji".

La gejunuloj de la vilaĝo Niutoŭ ĉiam tenas en sia memoro la heroajn farojn de la revoluciaj antaŭuloj kaj prenas sur sin pezajn laborojn. En tio Ma Lejing, membro de la Komunisma Junulara Ligo donis bonan ekzemplon. En printempo de la kuranta jaro ŝi kun la sturma taĉmento sub sia gvido venis al konstruejo de akvorezervejo. La vetero estis malvarmega kaj la profundaj kanaletoj pleniĝis je frosta akvo, sed ili persiste laboris en la koto. Sub la gvido de Ma Lejing la tasko estis rapide plenumita. Ŝi diris: "Ĉiufoje, kiam mi rememoras la heroaĵojn de la

revoluciaj antaŭuloj, mi sentas en mi neelĉerpeblan energion. Ni nepre disvolvos la gloran revolucionan tradicion kaj dediĉos la tutan vivon al la konstruado de la nova socialisma kamparo!”

ŜANĜI LA FIZIONOMION DE LA HEJMVILAĜO

La vilaĝo Niutoŭ havas nur salan kaj alkalan teron, kaj ĉiu muo da agro ĉiujare povis doni nur dekojn da kilogramoj da greno. Peniga estis la transformado de tiuj kampoj en fekundajn. Apenaŭ la partia filio de la brigado elmetis, en kunveno, la projekton de la transformado, la komunumanoj ĉiuj diris aprobe: “Se la daĝaj-anoj povis venki kalvajn montojn kaj ferocajn akvojn, do ankaŭ ni povos transformi la alkalajn kampojn en fekundajn.” “Por ni ne ekzistos nevenkebla malfacilo, se nur ni laboros energie kiel en la militaj jaroj!” Post la kunveno, pli ol 2,000 komunumanoj partoprenis en la konstruado, sub la gvido de Ma Hinting, la sekretario de la ĝenerala partia filio de la brigado. En neĝa vento ili fosis kanaletojn, ebenigis kampojn kaj riparigis irigacian sistemon utiligantan la akvon de Mi-rivero.

Kamarado Vang Fulong, sekretario en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la nuna vicsekretario de la ĝenerala partia filio, jam havas la aĝon de pli ol 60 jaroj, sed li ankoraŭ estas tiel energia kiel antaŭe. Li direktis la transformadon de la alkalaj kampoj kaj la plibonigadon de la irigacia sistemo. Ĉiutage li eklaboras frue kaj ripozas malfrue kaj ĉiam kaj ĉie donas ekzemplon. Li diris: “Socialisma socio ne venas mem, sed devas esti konstruita de ni propramane.” Foje en irigacia konstruado ponto estis detruita de torento, kaj Vang Fulong la unua iris ĝin ripari. Subite li falis en akvon du metrojn profundan kaj estis preskaŭ forportita de la torento. Estis frosta vintro, kaj aliaj volis sendi lin hejmen por ripozo, sed li neniel konsentis. Sekiginte la vestojn li denove eklaboris. En 9 jaroj, disvolvante la spiriton de penema lukto kontraŭ malfaciloj en la revoluciaj militaj jaroj, ili formovis 5,800,000 kubmetrojn da teraĵo, fosis kanaletojn kun totala longeco de 740 kilometroj kaj transformis 800 hektarojn da alkalaj kampoj. Nun oni vidas tie belan bildon formitan el interkruciĝantaj kanaletoj, nigre verdaj forstaj zonoj, reto da ŝoseoj, regulaj kampoj-

Kamarado Ma Panhiang rakontas revolucionan batalon al komunumanoj sur konstruejo.



Plugado



pecoj kun ondantaj grenplantoj kaj aromaj fruktoĝardenoj. . . En la kuranta jaro la loko suferis de sekegeco, sed la hektara produktokvanto de tritiko superis 3 tunojn, kio estas la plej bona rikolto en la historio de la vilaĝo, kaj la vilaĝo vendis 600 tunojn da tritiko al la ŝtato.

Antaŭe la vilaĝanoj de Niutoŭ trinkis nur saletan akvon. Poste oni starigis putofosan grupon. Ofte okazis falo de putomuro kaj intermiksiĝo de sala akvo kaj dolĉa akvo de malsamaj tavoloj, sed la grupo fine venkis la malfacilojn kaj sukcese fosis dekojn da dolĉakvaj putoj. Tio ne nur solvis la problemon de trinkakvo por homoj kaj brutoj, sed ankaŭ multigis la irigaciatajn kampojn.

La alia granda laboro plenumita de la vilaĝo estas reformado de la lago Gjudian. La lago sekiĝis en vintro kaj printempo kaj ricevas akvon en somero kaj aŭtuno. Tio malhelpis la kreskadon de fragmitoj en ĝi. La komunumanoj de la vilaĝo decidis fari al ĝi operacion. Ili fosis sur la fundo de la lago 87 kanaletojn kun totala longo de 215 km.

Ĉe la supra parto de la lago oni faris tri kanaletojn akvoenlasajn kaj ĉe la malsupra parto de la lago oni kompletigis la drenan sistemon, tiel ke en seka sezono oni povas konduki la akvon de la rivero en la lagon kaj en pluva sezono oni povas dreni la superfluan akvon en maron tra la elfluejoj. Kiam oni devas falĉi fragmitojn, oni povas dreni la akvon el la lago. Nun en somero sur la lago etendiĝas vasta areo de fragmitoj kaj en aŭtuno la floroj de fragmitoj kovras la lagon kvazaŭ neĝa tavolo. Ĉiujare oni povas rikolti grandan kvanton da fragmitoj, lotussemoj kaj lotusrizomoj. En la reformado de la naturo la popolo de la vilaĝo Niutoŭ skribas novan ĉapitron pri la konstruado de la nova socialisma kamparo.

ĈIAM PLIBONIĜAS LA VIVO DE LA VILAĜANOJ

Multe ŝanĝiĝis la vivo de la popolo de la vilaĝo. Dank' al la starigo de popola komunumo kaj la diligenta laboro de la popolo, la vilaĝo multe progresis en agrikulturo, forstumado, brutobredado, fiŝado kaj aliaj

Riĉa rikolto de greno



produktadoj, kio pli kaj pli bonigas la vivon de la vilaĝanoj.

Antaŭ la Liberiĝo la malmultaj bienuloj kaj kulakoj okupis plejparton de la tero de la vilaĝo. Ili ĉiamaniere ekspluatis la kamparanojn kaj bankrotigis multajn kamparanajn familiojn. Tiam pli ol 300 familioj de la vilaĝo forfuĝis aŭ almozpetadis kaj 37 familioj forvendis siajn infanojn pro malriĉeco. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito la japanaj invadantoj mortigis 278 homojn kaj forbruligis domojn kun pli ol 700 ĉambroj en la vilaĝo. Sed la popolo de Niutoŭ restis nevenkebla.

Post la Liberiĝo, kun granda aktiveco ĝi surpaŝis la vojon de kolektivigo kaj fondis popolan komunumon. Lernante de Daĝaj la vilaĝo pene disvolvas agrikulturon. Nun la popolo de la vilaĝo ne plu bezonas maltrankviliĝi pro manko de manĝaĵo kaj vestaĵo, kaj la vivo pliboniĝas jaron post jaro. Ĉiuj produktaj brigadoj havas kolektivan grenan rezervon kaj pli kaj pli multan komunan akumulon. Plejparto de la komunumanoj havas superfluan grenon kaj deponitan monon kaj la sumo de la deponita mono de la tuta brigado superis 200,000 juanojn. Komunumano Ma Gujhju laboregis dekojn da jaroj por bienuloj en la malnova socio, sed ankoraŭ devis manĝi branon kaj herbojn kaj sidis en ŝuldoj ĝis super ŝultroj. Lia nuna familio konsistas el 17 membroj, ricevas ĉiujare 4,250 kg. da greno kaj kontantan monsumon de pli ol 2,000 juanoj. En la lastaj jaroj lia familio konstruis sume 17 ĉambrojn, aĉetis biciklojn, radioricevilon, stebmaŝinon kaj deponis pli ol 1,500 juanojn.

En la vilaĝo Niutoŭ ankaŭ gemaljunuloj, kiuj ne havas idojn kaj perdis laborkapablon, havas facilan vivon. Post la fondiĝo de la popola komunumo la produkta brigado tuj starigis hejmon de maljunuloj, kiu akceptis unuj post aliaj pli ol 100 gemaljunulojn. Ili promenas, ŝakludas, aŭskultas radiosendon kaj ofte rakontas al lernantoj sian amaran vivon en la malnova socio. 70-jara avo Ma Jundi laboregis en la malnova socio kaj ne



Milicianoj en ekzercado

povis edziĝi pro malriĉeco. Li ofte diris: “En la granda familio de popola komunumo ĉiuj komunumanoj estas niaj karuloj kaj ni vivas tre bone.”

La vilaĝo Niutoŭ havas 7 infanĝardenojn, en kiuj la infanoj estas bone edukataj kaj kreskas sane. Dank’ al la infanĝardenoj la patrinoj povas labori sur kampoj kaj partopreni en sociaj kaj kulturaj aktivadoj.

La sanitarejo de la vilaĝo havas fakojn kirurgian, ginekologian kaj obstetrian kaj tiun de internaj malsanoj. La vilaĝo havas 14 “nudpiedajn” kuracistojn. Dum laborado kune kun komunumanoj ili ofte eksplikas al ili higienajn sciojn kaj kuracas ilin. Cetere ili mem kulturas kaj kolektas drogherbojn kaj faras el ili medikamentojn. Nun la ginekologia kaj obstetrika fakoj prizorgas akuŝon de ĉiuj virinoj de la vilaĝo kaj por tio la akuŝintoj ne bezonas pagi same kiel aliaj malsanuloj. Dank’ al pliboniĝo de la vivo kaj medicina servo la sano de la kamparanoj estas garantiata. Fundamente malaperis infektaj malsanoj, kiuj vaste cirkuladis antaŭe.

Rapide disvolviĝas la kultura kaj eduka afero. Ĉi tie populariĝis eduko de elementa

lernejo kaj multiĝas jaron post jaro diplomitoj de superaj kaj mezgradaj lernejoj. Antaŭ la Liberiĝo la lernejo de la vilaĝo havis nur 12 ĉambrojn, sed nun ĝi jam posedas 109 kaj jam starigis mezgradajn klasojn. Cetere la brigado starigis 7 vesperajn kursojn, en kiuj pli ol 300 komunumanoj lernas politikon, kulturon kaj sciencajn sciojn de agrikul-

tura produktado kio multe helpas ilin por levi la politikan konscion kaj klarecon kaj disvastigi avangardan agrikulturan teknikon.

En la batalo de konstruado de nova vivo la popolo de la vilaĝo Niutoŭ jam akiris grandajn sukcesojn, tamen ĝi ne kontentiĝis kun tio kaj decidis krei, per siaj laboremaj manoj, pli belan estontecon.



NOVA GRANDA KARBOMINEJO EN NINGHIA

Antaŭ nelonge finkonstruiĝis en la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono granda karbominejo nomata Vulkan, kiu produktas porkoaksan karbon. La nomita minejo kun modernaj ekipaĵoj estas relative alte mekanizita kaj povas produkti 900,000 tunojn da karbo ĉiujare laŭ la projekto. La ŝtato donis grandan atenton al ĝi kaj pli ol cent frataj unuoj de la tuta lando subtenis ĝian konstruadon.

GRANDA NOMBRO DA VALORAJ HISTORIAJ OBJEKTOJ ELTERIGITAJ APUD LA TOMBO DE LA UNUA IMPERiestRO DE KIN-DINASTIO


Kampanoj de Lintong-gubernio de Ŝenhi-provinco trovis grandegan foson kun fajencaj homfiguroj el Kin-dinastio (221-207 a.K.) en la orienta flanko de la tombo de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio. Post esplorado de arkeologiaj laborantoj oni konstatis, ke la foso longas de la orienta ĝis la okcidenta fino je 210 metroj, larĝas de la suda ĝis la norda fino je 60 metroj kaj profundas je 4.6-6.5 metroj. Ekde julio de la pasinta jaro,


en ĝia orienta fino oni prove fosis ĉ. 1,000 kvadratajn metrojn kaj elterigis el areo kun larĝeco de 60 metroj de la sudo ĝis la nordo 216 kavalirajn figurojn kiuj staris en 3 po-72-personaj vicoj vizaĝe al la oriento kaj post kiuj orde viciĝis 40 kolumnoj el po multaj homfiguroj. En tiu malgranda parto prove fosita oni trovis sume 314 kavalirojn kaj 24 fajencajn ĉevalojn. En la meza parto oni plie elfosis militistojn kaj ĉevalojn, kiuj estas verŝajne etendaĵo de la kolonaro. Oni taksas ke en la foso troviĝas ĉirkaŭ 6,000 kavaliraj figuroj viciĝintaj en kompleta batalformacio. La kavaliraj figuroj en kiraso altas je 1.82 metroj kaj tenas kiel siajn armilojn aŭ pafarkon kaj sagojn aŭ glavon aŭ lancan. La fajencaj ĉevaloj fortike aspektantaj kun grandeco de vera ĉevalo kvarope tiras militĉarojn. La detaloj de hom- kaj ĉeval-figuroj estas delikate skulptitaj. La homfiguroj havas diferencajn hararanĝojn kaj trajtojn. La ĉevaloj henas kun levita kapo kaj antaŭen klinitaj oreloj. La fajencaj hom- kaj ĉeval-figuroj ĉiuj estas tre vivecaj kun forta sensebleco de muskoloj. La grandioza militformacio konsistanta el tiuj valoregaj skulptaĵoj el antaŭ 2,100 jaroj prezentas al ni la grandiozan faron de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio kiu galopis sur mil liojn vasta lando por likvidi la postrestantan forton de la sklavposedantoj kaj unuigi la tutan Ĉinion. Ĝi ankaŭ manifestas la saĝon kaj altan skulptan arton de laboranta popolo de Kin-dinastio.

La prospera stepo de Sajram-lago

Sur la mapo de Ĉinio oni povas trovi Sajram-lagon en la okcidenta parto de Tianŝan-montaro de Hingiang. La lago je 2,100 metroj super la marnivelo estas ĉirkaŭata de montoj, kaj inter la verdaj montoj kaj la blua lago troviĝas granda stepo, la stepo de Sajram-lago, kun longeco de ĉ. 170 kilometroj. La vasta stepo kun abundo de akvo kaj herboj estas fama natura paŝtejo en somero de Hingiang. En varma somero ĉiujare la paŝtistoj de la ŝtataj brutobredejoj kaj popolaj komunumoj de la ĉirkaŭaj gubernioj paŝtas brutarojn tie. Kaj en tiu tempo, de loĝpunktoj de popolaj komunumoj venas tien vendistoj, kuracistoj kaj filmprojekciistoj por servi al la paŝtistoj kaj ankaŭ lernejoj estas funkciigataj tie. Kaj ĉe la lago okazas ankaŭ ĉiujara foiro. Komercaj fakoj transportas tien grandan kvanton da vivbezonaĵoj kaj aliajn objektojn bezonatajn de paŝtistoj kaj la lastaj vendas siajn brutajn produktaĵojn al la ŝtato.

En la foiro okazas krome prezentadoj de kantoj kaj dancoj fare de amatoraj artistoj de gubernioj kaj komunumoj, kaj la paŝtistoj faras tradician konkurson de ĉevaloj kaj luktado. Ĉie tiam sur la stepo ŝvebas ridoj kaj kantoj. La paŝtistoj prikantas la gvidon de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, ke ili vivas feliĉan vivon, marŝas sur la socialisma vojo kaj la antaŭa mizera stepo fariĝas pli riĉa kaj pli bela.







Melkado

Lano ačetita de la štato







Ĉevalaro

Veterinaroj faras ekzamenadon al brutoj.





Prezentado por paŝtistoj



Danco

Elektado de varoj





Respondeculo de la Virina Federacio de Hingiang kunsidas kun paŝtistinoj sur la paŝtejo.




La partia sekretario de la paŝtejo vizitas paŝtistan familion.

Irigacia kanalo estas konstruata por disvolvi brutobredadon kaj agrikulturon.






Kazaĥa kuracisto faras ekzamenadon al infano sur la paŝtejo.



Kazaĥaj geknaboj




Milicanoj sur la stepo

La Konkurso




Plongo



Tajlanda plongisto




Singapora plongistino



Siria plongisto


Pekina Internacia Amikeca Invita de Naĝado kaj Plonĝado



Konkurso



Diverslandaj plonĝistoj kaj trejnistoj




Ĉina plonĝistino



Ĉina plonĝisto

Unuiĝo kaj forto de la sportistoj de disvolviĝantaj landoj



Kanto pri amikeco



Kuraĝigojn kaj
gratulojn unu al
alia



Pri amikeco


Ankoraŭ pli grandajn sukcesojn



Interŝanĝo de sperto

Korverŝa interparolado ĉe naĝejo





Sur la Granda Muro

Kunveno de solidareco kaj amikeco

DE la 2-a ĝis la 10-a de aŭgusto okazis en nia ĉefurbo la Pekina Internacia Amikeca Invita Konkurso de Naĝado kaj Plonĝado. Tiu ĉi konkurso estas aranĝita de la Naĝa Asocio de la Ĉina Popola Respubliko por plifirmigi la amikecon kaj solidarecon inter la popoloj kaj sportistoj de diversaj landoj kaj akceli la disvolviĝon de naĝsporto, per konkurso kaj amikaj aktivadoj.

En la konkurso partoprenis, laŭ invito de la Naĝa Asocio de la Ĉina Popola Respubliko, pli ol 300 sportistoj kaj delegitoj de Albanio, Alĝerio, Birmo, Kongolando, Irako, Jamaiko, Malajzio, Meksikio, Maroko, Pakista-

no, Palestino, la Filipinoj, Singaporo, Somalio, Sri-lankao, Sudano, Sirio, Tanzanio, Tajlando, Tunizio, Venezuelo kaj Zairo. Malgraŭ longa laciga veturado, ili venis en ĝojo al Pekino kaj alportis al ni la valoregan amikecon de la popoloj kaj sportistoj de diversaj landoj. Dum la konkurso, sportistoj de Ĉinio kaj tiuj de aliaj 22 landoj kaj regionoj faris amikajn konversaciojn, interŝanĝis sperton, montris noblan sportan stilon kaj akiris bonajn sukcesojn. La diverslandaj amikoj nomis tiun ĉi konkurson “kunveno de solidareco kaj amikeco”. La konkurso faris pozitivan kontribuon al firmigo kaj disvolvo de la amikeco

La Organiza Komitato de la Konkurso donacis amikecan pokalon al la delegacioj, delegitoj kaj observantoj de la 23 landoj kaj regiono.





Sudanaj amikoj en la parko Ĉiela Altaro.

kaj solidareco inter la popoloj kaj sportistoj de la disvolviĝantaj landoj. La diverslandaj sportaj amikoj venis al Pekino venkinte subpremon kaj barojn kaj per tiu spirito de solidara batalo esprimis la firman decidon de la popoloj kaj sportistoj de la disvolviĝantaj landoj pri opono kontraŭ hegemoniismo.

La registaroj kaj sportaj rondoj de koncernaj landoj tre atentis tiun ĉi konkurson kaj multaj landoj sendis al la konkurso siajn plej eminentajn sportistojn. Malgraŭ la malhelpado kaj subfosado fare de malmultaj gvidantoj de la Internacia Federacio de Naĝaj Amatoroj, la diverslandaj sportistoj venis kun la komuna volo "por amikeco".

Kontraŭ la hegemonia sinteno de la malmultaj gvidantoj de la Internacia Federacio de Naĝaj Amatoroj, multaj amikoj esprimis: "Niaj landoj estas sendependaj kaj niaj aferoj devas esti deciditaj de ni mem." Siria trejnisto Tayseir Hamou diris: "Nenion timas

ni sirianoj. Ĉu ni timas ion alian, se ni kuraĝas batali kontraŭ la izraelaj agresantoj subtenataj de Usono?" La estro de la meksikia delegacio Rodolfo Aznar Romero diris: "Ni fieras, ke ni povas veni al Ĉinio por partopreni en la amikeca invita konkurso." La estro de la sudana delegacio Mohmd Talaat Fareed montris: "Malmultaj gvidantoj de la Internacia Federacio de Naĝaj Amatoroj klopodis malhelpi siajn membrojn-ŝtatojn partopreni en la invita konkurso, tio estas malkonforma al la devo de internacia organizo." Estroj kaj delegitoj de 19 landoj kaj regionoj partoprenintaj en la konkurso kune skribis al la prezidanto de la Plenuma Buroo de la Internacia Federacio de Naĝaj Amatoroj por esprimi sian fortan postulon ke ĝi forpelu la klikon de Ĉiang Kajŝek kaj redonu la leĝan sidlokon al Ĉinio. La popolo kaj la naĝista rondo de Ĉinio esprimis eksterordinaran estimon al la justamo kaj braveco de la diverslandaj amikoj en batalo. La alveno de la amikoj estas subteno kaj stimulo al ni kaj havigis al ni bonan ŝancon por lerni de ili.

La ĉinaj sportistoj kaj la diverslandaj amikoj interhelpis kaj kuraĝigis unu la alian en kuna ekzercado kaj en konkursado, kaj krome ili kune vizitis fabrikojn, popolajn komunumojn, lernejojn, infanĝardenojn, pitoreskejojn kaj historiajn lokojn en Pekino. En la vizitado, la diverslandaj amikoj vaste kontaktis diversajn popolamasojn de Pekino. Gvidantoj de nia lando intervidiĝis kun kaj aranĝis bankedojn honore al la sportistoj de diversaj landoj. Dum la tuta invita konkurso, la amikoj vivis en atmosfero de solidareco kaj amikeco ĉie kie ili estis.

Apud la naĝbaseno Taŭjanting en Pekino, oni povis vidi ĉie kortuŝan scenon de interhelpo kaj interlernado inter trejnistoj kaj sportistoj. La albana trejnisto entuziasme helpis palestinajn amikojn fari ekzercadon antaŭ konkurso kaj pacience diris sian sperton al la amikoj. Rimarkinte ke ĉina sportisto Luo Ĝaŭjing tro alte levis sin por spiro je returno en 50-metra papilinaĝo, kio malbone influis la rapidecon, iu meksikia veterana sportisto tuj diris tion al la ĉina trejnisto

Ĉeng Junpeng kaj interkonsiliĝis kun Luo Ĝaŭjing pri korekto de tiu movo. Kiam somalia sportisto bezonis helpon, la ĉina veterana trejnisto Tu Guangbin meminitate prenis sur sin tiun taskon. Ĉiufoje, kiam oni petis helpon de singapora trejnisto pri naĝarto, la lasta ĉiam senrezerve diris al ili sian sperton. Vidante ke la sportistoj de malsamaj haŭtkoloroj interŝanĝas sperton de naĝado kaj amikajn vortojn per malsamaj lingvoj kaj gestoj, en kaj ekster naĝbaseno aŭ sur ripozejo, la rigardantaj amasoj tiel kortuŝiĝis, ke ili sentis sin kvazaŭ baniĝantaj en oceano de amikeco. La estro de la pakistana delegacio Muhammad Latif Butt diris kortuŝite: “En tiu ĉi konkurso, ĉiuj rigardas teknikon kaj sperton kiel komunan posedaĵon kaj vere manifestis la spiriton de amikeco.” Dum ekskurso al la Granda Muro la diverslandaj amikoj ĝoje ĝuis la pejzaĝon kaj reciprokis amikecon. La somaliaj amikoj donacis sian teaman flagon al la administrejo de la Granda Muro kaj diris: “La flago restu sur la Granda Muro de Ĉinio por montri ke ni estas ĉiam kune.”

Dum tiu ĉi invita konkurso, 29 disciplinoj de naĝado estis faritaj, sportistoj de 14 landoj

kaj regionoj gajnis la ok unuajn lokojn kaj sportistoj de 11 landoj rompis 68 rekordojn de siaj landoj. Interalie, la sportistoj de



Birmaj sportistinoj ameme prizorgas Sirirata Chankasiri el Tajlando, la plej junan sportiston en tiu ĉi konkurso.

Maroka, tunisa, sudana, palestina kaj somalia sportistinoj en naĝbaseno



Singaporo gajnis la ĉampionecon de 7 disciplinoj. La 11-jara sportistino Junie Sng Poh Leng superis la rekordon de 400-metra rapidnaĝo de la Sepa Azia Sportkunveno per 4 minutoj kaj 46.98 sekundoj. En tiu ĉi konkurso ŝi gajnis ĉampionecon de du disciplinoj. Ankaŭ la ĉinaj sportistoj atingis bonan nivelon en la konkurso, gajninte ĉampionecon de 18 disciplinoj kaj rompinte 16 landajn rekordojn. Altigita estas la nivelo de la sportistoj de Malajzio, la Filipinoj, Albanio, Alĝerio k.a. kaj nemalmultaj sportistoj rompis rekordojn de sia lando. Multaj el la sportistoj de Maroko, Sudano, Kongo-lando, Sri-lankao, Pakistano, Irako kaj Somalio estas debutantoj. Veninte al Pekino, ili modeste lernis de diverslandaj sportistoj, kaj akiris bonajn rezultojn en la konkursado.

La sportistoj de Ĉinio, Singaporo, Tajlando kaj Sirio altiris al si atenton en la plonĝa konkurso. Ĉina sportisto Li Kongĝeng, kiu akiris bonan rezulton en la Sepa Azia Sport-

kunveno, montris plialtigon de sia tekniko en tiu ĉi konkurso. Siria sportisto antaŭe ne ekzercis sin pri plonĝo de sur 10-metra turo. Alveninte Pekinon, li modeste lernis de diverslandaj amikoj kaj rapide posedis la teknikon, partoprenis en la konkurso kaj ricevis laŭdon de la rigardantaro.

Kvankam finiĝis la Pekina Internacia Amikeca Invita Konkurso de Naĝado kaj Plonĝado, tamen la profunda amikeco naskiĝinta inter la amikoj de naĝsporto de la disvolviĝantaj landoj ĉiam gravuriĝis en ĉies memoro. La estro de la singapora delegacio s-ro Woon Sui Kut diris: "La konkurso havigis al la amikoj de naĝsporto de la 23 landoj kaj regionoj bonan ŝancon por interkompreniĝi, lerni unuj de aliaj kaj saluti unuj aliajn. Ĉi tie ĉiuj sentas sin kvazaŭ vivantaj en sia feliĉa familio. Post kelkaj tagoj ni devos forlasi Ĉinion bedaŭre kaj tio estos la plej malfacila ero el nia tuta programo. Ni certe portos la plej varman amikecon spertitan ĉi tie inter ni al nia lando."

Batalo kontraŭ hajlo por riĉa rikolto


POR garantii riĉan rikolton de agrikulturo, la vasta amaso de kadroj kaj komunumanoj en nia kamparo, kun firma kredo, ke la homa volo certe venkos la naturon, bataladis kontraŭ hajlo per kanonoj kaj raketoj faritaj de ili mem kaj kontraŭaviadilaj kanonoj, kaj atingis rimarkindajn sukcesojn. Ilia praktiko pruvis, ke damaĝa hajlado longe rigardata kiel nepreventebla, estas venkebla de la vasta popolo armita per Maŭzedongpenso.

Laŭ statistiko de la Centra Meteologia Buroo, hajlopreventa laboro jam estas farata

en 24 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando, inter kiuj en Gansu, Ŝenhi, Hebej, la Interna Mongolio, Liaŭning, Pekino, Kinghaj, Siĉuan, Junnan kaj Gujĝoŭ lokon havis tia laboro kun pli granda skalo. La provincoj Gansu kaj Ŝenhi disvolvis hajlopreventan aktivadon en pli ol 50 gubernioj kun partopreno de pli ol 30,000 laborantoj respektive. En nemalmultaj regionoj, produktaj brigadoj, komunumoj kaj gubernioj kunagas en prevento de hajlo, per obusoj, kiuj eksplodas alte en la aero, loke faritaj raketoj

kaj kontraŭaviadilaj kanonoj anstataŭ kano-
noj loke faritaj antaŭe. Hajlopreventado ri-
markinde helpas en protekto de agrikulturaj
plantaĵoj. Antaŭe en Hijang-gubernio de
Ŝanĥi-provinco en Tajĥang-montaro ĉiujare
hajlis ĉ. 20-foje kaj ĉ. 8,000 hektaroj da
grenplantoj estis plagitaj, rezulte de kio la
rikoltita greno estis reduktita je 5,000 tunoj.
Post disvolvo de la hajlopreventita laboro en
tiu gubernio en 1969, la tri hajlolinioj de la
gubernio estis fundamente regataj, la relative
grandaj hajloplagoj estis sukcese preventitaj
kaj rezulte de tio la hajloplagita areo reduk-
tiĝis je 50 procentoj kompare kun tio antaŭe.
Daĝaj-komunumo fundamente liberigis sin de
hajloplago en la pasintaj ses jaroj, en kiuj ĝi
faris batalon kontraŭ tio. Kimeng-brigado
de Ljucing-gubernio, Gansu-provinco, sukcese
preventis hajladon en 10 jaroj, kaj Mianning-
gubernio de Siĉuan-provinco faris hajlopre-
venton en 18 jaroj kaj sukcesis iom post iom
malpliigi la hajloplagon. Ili starigis lernin-
dan ekzemplon kaj pretigis valoran sperton
en hajloprevento por aliaj lokoj. Vidinte la
ĝojindajn sukcesojn en tiu laboro, popolanoj
diris, ke dank' al la batalo kontraŭ hajlo per
simplaj kanonoj kaj raketoj, la popolo povas
ŝanĝi veteron kaj fari pli grandan kontribuon
per riĉaj rikoltoj de greno kaj oledonaj semoj.

Hajlopreventado estas batalo de la homaro
kontraŭ la naturo kaj ankaŭ revolucio de
materiismo kontraŭ ideismo. Iuj opiniis, ke
hajlado estas nerezistebla natura katastrofo
kaj oni povas fari nenion kontraŭ ĝi. Sed
fakte ne tiel estas. Post kritikado kontraŭ
determinismo en la Granda Proleta Kultura
Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ
Lin Biaŭ kaj Konfucio, la kadroj kaj popol-
amasoj en nia kamparo firme kredas materiis-
mon kaj la venkeblecon de la naturo. Ili
decidis eltrovi la leĝojn de estiĝo, disvolviĝo
kaj prevento de hajlo por fariĝi mastro de la
naturo kaj akiri riĉajn rikoltojn en agrikul-
turo. Vastaj amasoj de malriĉkamparanoj
kaj malsuperaj mezkamparanoj kun plena
memfido partoprenis en scienca eksperimen-



Raketoj flugas al nubaro

tado pri preventado de hajlo kaj per tio skri-
bis novan paĝon en hajloprevento de nia
lando. Ni prenu la antaŭurbon de Pekino
kiel ekzemplon. Antaŭ la Granda Proleta
Kultura Revolucio ekzistis nur kelkaj hajlo-
preventaj punktoj en unu gubernio, dum nun
jam stariĝis 376 tiaj punktoj en 74 komun-
moj de 11 gubernioj (aŭ distriktoj) kaj
formiĝis unuapaŝe amasa hajlopreventita reto.
En multaj lokoj oni rigardas hajlopreventon
kiel gravan laboron por protekti posedaĵojn
kaj vivon de laborantaj popolanoj. La par-
tiaj komitatoj en diversaj niveloj plifortigis

sian gvidadon, starigis hajlopreventajn komandejojn, organizis koncernajn personojn por fari enketon kaj esploron, resumi sperton, fari edukadon pri scienca hajlopreventado kaj fari eksperimentojn pri hajloprevento, tiel ke la amasa hajlopreventa laboro estas pliapaŝe antaŭenpuŝita.

La sperto de avangardaj unuoj montris, ke por efike kontraŭbatali hajloplagon, oni devas disvolvi produktadon de simplaj kanonoj kaj raketoj kaj aranĝi potencon fajroretan subtenate de la ŝtato kaj sin apogante sur la kolektivaj fortoj de la popola komunumo kaj per densaj kaj intensaj pafoj detruu la internan strukturon de hajlonuboj. Nur tiamaniere oni povas efike regi partan veteron kaj preventi hajladon. Multaj popolaj komunumoj kaj brigadoj kritikis la eraran penson "la ŝtato donu monon kaj la amaso faru la laboron de hajloprevento", mem kolektis kapitalon, serĉis materialon kaj mem faris pulvon kaj obusojn, tiel ke la hajlopreventa laboro estas farita bone kaj ekonomie. Ĉiuj komunumoj kaj brigadoj de Minhian-gubernio de Gansu-provinco havas sian propran pulvofarejon aŭ obusofarejon kaj en la pasinta jaro, ili eĉ starigis tian farejon ĉe hajlopreventaj punktoj. 17 el la 22 komunumoj de la Tu-a Aŭtonoma Gubernio de Huĝu fondis fabrikon de simplaj raketoj. Dank' al tio, tiuj lokoj liveris oportunan rimedon en hajlopreventado. Oni ankaŭ klopodas por senĉese altigi la efikon de la hajlopreventaj bataliloj per la saĝo de la amasoj. La kanonoj faritaj de Ĝuanghe-gubernio de Liaŭning-provinco povas sendi obuson ĝis alteco de 1,500 metroj kaj la raketoj faritaj de Jongdeng-gubernio de Gansu-provinco povas sin ĵeti ĝis alteco de 2,400 metroj. Krom uzo de loke faritaj kanonoj kaj raketoj, oni uzas ankaŭ modernajn ekipaĵojn kiel kontraŭaviadilajn kanonojn kaj radaron por pli efike preventi hajlon en loko kiu tion havas. La praktikado montras, ke samtempa uzo de lokaj kaj modernaj rimedoj kun la unuaj kiel la ĉefaj en batalo kontraŭ hajlo por gajni riĉajn rikoltojn tre taŭgas por la kamparo de nia lando.

La meteologiaj laborantoj de nia lando aktive partoprenas en la hajlopreventa praktikado de la vasta kamparo kaj forte akcelas la disvolviĝon de tiu laboro. En la lastaj jaroj, la meteologiaj institucioj kaj institutoj en diversaj niveloj plifortigis la observadon, analizadon kaj esploradon de hajlo. La meteologiaj institucioj de Gansu, Kinghaj, Ŝenhi, la Interna Mongolio kaj Pekino kaj la Instituto de Atmosfera Fiziko de la Ĉina Akademio de Sciencoj fondis bazojn de scienca esplorado por hajloprevento en lokoj de seriozaj hajloplagoj. En sezono de hajlado, ili ekspedas meteologiajn laborantojn al la lokoj por tie fari esploradon kaj resumi sperton kune kun lokanoj. En lokoj hajlozaj, la laborantoj de meteostacioj helpis popolajn komunumojn kaj brigadojn trovi la fonton de hajlo kaj koni la vojlinion kaj leĝojn de hajlado. Samtempe ili kombinis la praktikan sperton de la amasoj en observado de nuboj kaj aliaj naturaj fenomenoj kaj aŭskultado de tondroj kun modernaj instrumentoj kaj metodoj por antaŭdiro pri hajlo, kio ebligis al ili ĝustatempe doni meteoinformojn kaj antaŭsciigojn por prevento de hajlo. En kuna laborado de hajlopreventado kaj scienca eksperimentado kun lokaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la laborantoj de la hajlopreventa eksperimenta punkto de Jongdeng sub la Instituto de la Meteologia Buroo de Gansu-provinco akiris grandan kvanton da freŝaj materialoj, altigis la ĝustecon de la antaŭinformoj pri hajlo kaj faris reserĉon pri principoj de neniigo de hajlo.





GRANDA KUNMETITA ILMAŜINO CIFERE REGATA FARITA DE DALIAN

La nomitan ilmaŝinon sukcesis fabriki la Dalian-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko kaj per tio pretiĝis kondiĉoj por aŭtomata kaj pogranda fabrikado de potencaj dizeloj por lokomotivoj en nia lando.

En 1973, la nomita fabriko produktis 4,000-ĉevalpovajn dizelajn lokomotivojn kaj trovis, ke pli ol 50 horoj estas bezonataj por bori centojn da grandaj kaj malgrandaj truoj sur cilindrobloko de dizelo de lokomotivo. Por rapidigi tiun laboron, la laboristoj de koncerna laborejo de la nomita fabriko decidis mem fari grandan aŭtomatan ilmaŝinon kaj nun ili finfine sukcesis.

La farita ilmaŝino kun pli ol 20,000 konsistigaj pecoj longas 25 metrojn. Ĝi estas manipolata per elektronika komputilo kaj povas bori centojn da truoj sur cilindrobloko de dizelo en 4 horoj.

NOVA MODERNA KEMISTERKA FABRIKO EN HINGIANG

Nova moderna Hingiang-a Kemisterka Fabriko finkonstruiĝis en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj ĝia produktado senĉese disvolviĝis en la pasintaj monatoj post ĝia ekfunkcio. La fabriko aplikis novan teknologion kaj ekipaĵojn projektitajn kaj fabrikitajn de nia lando mem. Ĝia procedo estas simpla,

la manipulado facila, la konsumo de energio relative malmulta kaj ĝia personaro relative malgranda. La kemia sterko produktita de ĝi jam estas transportita al kamparo sude kaj norde de Tianŝan-montaro kaj estas varme akceptata de la lokaj kamparanoj diversnaciecaj.

LA PRECIZA ALTECO DE LA PLEJ ALTA MONTO DE LA MONDO

La alteco de Ĝomolangma, la plej alta monto de la mondo, delonge altiras atenton de diversaj landoj kaj oni mezuris ĝin plurfoje. En la pasinteco, ĝenerale uzata estis la alteco de 8,882 metroj, kiun determinis fremdlandanoj en la komenco de la kuranta jarcento. Por determini la precizan altecon de Ĝomolangma super la marnivelo, ĉinaj mezuristoj surgrimpis, kune kun ĉinaj montogrimpistoj en la periodo de marto ĝis majo de la kuranta jaro, Himalajon kaj ĉe lokoj de 5,000 kaj pli ol 7,000 metroj super la marnivelo, remezuris la precizan nivel-linion de la distrikto per triangula, transira kaj astronomia observado kaj gravita mezurado. Post kiam ĉinaj sportistoj starigis unuafoje sur Ĝomolangma mezuran signalon kaj mezuris la dikecon de la neĝtavolo kovranta la montsupron, ĉinaj mezuristoj samtempe faris observadon kaj mezuradon sur 10 punktoj je 7 ĝis 21 kilometroj for de la montsupro kaj je 5,600 ĝis 6,300 metroj super la marnivelo, sukcese plenumis la taskon de mezurado pri la situo kaj alteco de Ĝomolangma kaj akiris kompletajn mezuritajn donitaĵojn. Poste, la mezuristoj faris zorgan kalkuladon kaj ricevis la precizan altecon de Ĝomolangma (ekskluzive de la neĝtavolo sur la supro), nome 8,848.13 metroj super la marnivelo kun la meznombra akvonivelo de la Flava Maro determinita de la Tajd-observejo de Kingdaŭ kiel la normo.

Malgrandaj akvoturbinoj

ĈIJARE en la unua n-ro de nia gazeto ni prezentis al niaj legantoj la hidroelektrejon Liugiahia — la plej grandan hidroelektrejon sur la Flava Rivero de nia lando. Tiu elektrejo estas ekipita per 300,000-kilovata akvoturbina generatora kompleto kun interne farita duobla akva malvarmigo, projektita kaj fabrikita de Ĉinio. Nun ni prezentas al niaj legantoj malgrandan akvoturbinon de nia lando sukcese faritan en la lastaj jaroj, kies plej malgranda kapacito estas nur 250 vatoj.

Kial oni projektis kaj fabrikis tiel malgrandan akvoturbinon kaj kiel ĝi naskiĝis?

I

En la vastaj montregionoj de nia lando sin trovas tre multaj akvofontoj grandaj aŭ malgrandaj. Nia lando bezonas konstrui multajn hidroelektrejojn grandajn kiel Liugiahia, sed en mallonga tempo la elektro de la grandaj kaj mezaj elektrejoj ne povas atingi malproksimajn kaj dise lokitajn montvilaĝojn. La malgranda akvoturbina generatoro estas oportuna por konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj. Pro la apero de tiaj generatoroj niaj sennombraj fluoj povas esti plene utiligataj kaj malgrandaj hidroelektrejoj povas liveri elektron al proksimaj vilaĝoj. Tiaj generatoroj ludos gravan rolon por realigo de elektrizado de agrikulturo en niaj montregionoj.

En la lastaj jaroj la Tiangin-a Projekta kaj Esplora Instituto de Elektra Transmisio kaj koncernaj unuoj projektis kaj fabrikis malgrandajn akvoturbinojn kun malsamaj kapacitoj. Tiaj turbinoj estas malpezaj, malgrandaj, facile produkteblaj kaj ripareblaj kaj malmultekostaj, tial eĉ produktaj taĉmentoj de komunumoj povas aĉeti kaj uzi ĝin.

La elektro produktita de tiaj generatoroj taŭgas por lumigo, funkciigo de radioriceviloj, pumpiloj kaj etaj prilaboraj maŝinoj de agrikulturaj produktaĵoj.

La malgrandaj akvoturbinoj povas esti vaste uzataj kaj la tekniko por ilin fari ne estas tre komplika. Sed antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, influate de la reviziisma linio en scienca studo, iuj gvidantoj de tiu instituto blinde faris studon de altklasaj, precizaj kaj plej modernaj objektoj kaj ne donis atenton al la studo kaj projekto de malgranda akvoturbina generatoro. Tiam la plej malgranda el la akvoturbinoj projektitaj kaj fabrikitaj de ili havis kapaciton de 12 kilovatoj, kaj ne konformis al la bezono de konstruado de hidroelektrejoj en la vasta kamparo de niaj montregionoj.

Somere de 1970, Ĝang Ŝoŭjan, laboristo de la instituto kaj aliaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj venis al montoza Kinglong-gubernio de Hebej-provinco por fari enketon pri akvoenergiaj fontoj. La entuziasmo de la kamparanoj de la loko pri konstruado de malgranda hidroelektrejo donis al ili fortan impreson. Tiam Vangĉang-komunumo estis konstruanta hidroelektrejon. Iu maljuna onklino estis unu el la plej aktivaj konstruantoj. Ŝia hejmo distancas de la konstruejo 15 kilometrojn. Kvankam la montvojo estis malfacila, sed ĉiumatene ŝi venis al la konstruejo frue. Oni admonis ŝin ne iri al la konstruejo, sed ŝi diris: “Vi povas labori anstataŭ mi, sed tio ne povas montri anstataŭ mi mian deziron por konstrui malgrandan hidroelektrejon.” Antaŭ la faktoj, Ĝang Ŝoŭjan pensis en si: “Nia tasko estas esplori kaj projekti akvoturbinojn. La kamparanoj de montregionoj tre bezonas malpli grandajn akvoturbinojn, sed ni ne projektas

tion. Kia problemo tio estas?" Li relernis la instruon de Prezidanto Maŭ **"La problemo 'por kiuj' estas problemo fundamenta, problemo principa"**, kaj konis ke la problemo **"al kiuj servi"** esence estas problemo pri batalo inter la du linioj. La scienculoj kaj teknikistoj havos ĝustan direkton en siaj laboroj, nur se ili starigos al si la penson servi al la plejparto de la popolo. Ĝang Ŝouĵan firme decidis fabriki malgrandan hidroturbinon laŭ la kondiĉoj de akvofontoj de la vastaj montregionoj de nia lando kaj laŭ la kapablo de la fabrikoj funkciigataj de gubernio kaj komunumo, por ke la kamparanoj, paŝtistoj kaj fiŝistoj dise loĝantaj en montaj kaj landlimaj vilaĝoj, sur stepoj kaj insuloj povu utiligi fontojn kaj subterajn riverojn en produktado de elektro.

Subtenate de la gvidantoj de la instituto, Ĝang Ŝouĵan, teknikisto Si Liangĝaŭ k.a. komencis provan fabrikadon de malgranda akvoturbino.


II

Post ripetada klopodo akvoturbino kun kapacito de 1.5 kilovatoj estis farita. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ **"praktiko estas la kriterio de vero"**, Ĝang Ŝouĵan kaj Si Liangĝaŭ decidis iri en la kamparon


por ekzameni la akvoturbinon per produkta praktiko.

Ili venis al Diebaŭgoŭ-taĉmento de King-long-gubernio, malgranda montvilaĝo kun 22 familioj norde de la Granda Muro. Antaŭ la Liberiĝo la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis ekspluatataj de bienuloj kaj tiel malriĉaj, ke ili devis uzi kenan torĉon anstataŭ olean lampon. Post la Liberiĝo, la vivo de la kamparanoj estis multe bonigita kaj multaj montvilaĝoj jam uzis elektron, sed tiu vilaĝeto ankoraŭ ne povis uzi ĝin pro troa malproksimeco de elektra reto. Kiel la vilaĝanoj deziregis mem havi malgrandan hidroelektron! Tie ĉe la monta talio troviĝas fonteto, el kiu fluas ĉiusekunde nur unu kilogramo da akvo. Tial la deziro de la kamparanoj en longa tempo ne povis plenumiĝi. En la Granda Kultura Revolucio, ili disvolvis la revolucionan spiriton kuraĝi pensi kaj agi kaj decidis mem konstrui etan akvorezervejon kun kapacito de centoj da kubmetroj por produkti elektron. Iuj malbonintenculoj diris moke: "Ĉu laĝeto povus produkti elektron? Vera deliraĵo!" Sed la kamparanoj diris: "En la socialisma socio multas novaj aferoj, kaj ankaŭ la laĝeto povos produkti elektron. Se vi ne kredas, atendu kaj vi vidos!" La kamparanoj

0.25-kilovata hidroelektra generatoro



3-kilovata hidroelektra generatoro



unuanime laboris kune kaj finfine konstruis la akvorezervejon.

La deziro de la kamparanoj kaj la eduko de klasa batalo donis al Ĝang Ŝouĵan kaj Si Liangĝaŭ neelĉerpeblan forton. Ili decidis instali ĉi tie la faritan akvoturbinon de 1.5 kilovatoj. Antaŭ la instalo ili faris al ĝi detalan esploron kaj reformon laŭ tiulokaj kondiĉoj. En la tago de lanĉo kamparanoj loĝantaj ĉirkaŭ la vilaĝeto fore je dekoj da lioj alvenis por tion vidi. Kiam la maŝino ekfunkciis, elektraj lampoj tuj prilumis la tutan montvilaĝeton.

La normala funkciado de la unua malgranda akvoturbinata generatoro pliaktivigis Ĝang Ŝouĵan kaj Si Liangĝaŭ en konstruado de elektrejoj por kamparanoj. Subtenate de la partia komitato de la instituto oficiale fondiĝis la “esplora grupo de malgrandaj akvoturbinatoj”.

III

Ĝang Ŝouĵan kaj liaj grupanoj estis ne kontentaj pri la jam atingita sukceso. Ili trovis mankojn de la unua akvoturbinato en produkta praktiko kaj scienca eksperimentado. Ĉar tiu akvoturbinato estis de tipo proporcie malgrandigita laŭ tiu de granda kapacito, la alaj padeloj de ĝia rado postulis kompare komplikitan teknologion en fabrikado, ju pli malgrandaj estis la padeloj, des pli malfacile prilaboreblaj ili estis. La fabrikoj de gubernioj kaj komunumoj sen necesaj gisaj kondiĉoj kaj relative altaj teknikaj fortoj ne povis produkti tiajn padelojn, por ne paroli pri ĝiaj disvastigo kaj aplikado. Krome, ili konsideris, ke malgranda akvoturbinato de sama kapacito ne konformis al malsamaj bezonoj de montregionoj kun malsama akvoenergia fonto. Tial ili decidis unue fari renovigojn al la akvoturbinato de 1.5 kilovatoj kaj poste projekti kaj produkti malgrandajn hidroturbinatojn de malsamaj kapacitoj.

En 1956 Ĝang Ŝouĵan ĉeestis la tutlandan konferencon de avangarduloj de maŝinindustrio kaj havis la feliĉon vidi Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la ĉina popolo.

Tio ĉiam stimulas lin marŝi antaŭen. Li pensis en si, ke Prezidanto Maŭ instrukciis al ni “**preni agrikulturon kiel bazon**”, ni laboristoj nepre devas servi al la politiko de la proletaro per nia tekniko. Por reformi la padelojn li cerbumadis eĉ dum irado kaj manĝado kaj desegnis skizojn en sia hejmo post laboro. Li ripetade observis movadon de la rado de akvoturbinato kaj akvofluo, faris sciencajn analizojn al la formo de la padeloj kaj prezentis novan projekton pri la padeloj. Ĝang Ŝouĵan kaj aliaj teknikistoj de la grupo faris al la projekto seriozan esploron, faris en la hidroelektraj ĉelokoj eksperimentadon, faris plurajn plibonigojn al ĝi kaj fine sukcesis. Laŭ la nova projekto ili projektis malgrandajn akvoturbinatojn kun 7 malsamaj kapacitoj de 250 vatoj ĝis 12 kilovatoj. Eĉ vilaĝeto kun 2 aŭ 3 familioj ankaŭ povas utiligi malgrandan fonton per akvoturbinato de 250 vatoj por lumigado.

La desegnaĵojn de tiuj akvoturbinatoj eĉ ordinaraj laboristoj povas kompreni, kaj tian akvoturbinaton povas fabriki ne nur agrikulturilaj fabrikoj de subprovincoj kaj gubernioj, sed ankaŭ tiuj de komunumoj kaj brigadoj. La nunaj teknikaj fortoj de kamparo povas fari al ili riparadon. Unu malgranda akvoturbinata generatoro de 1.5 kilovatoj inkluzive de la lampoj kostas nur pli ol 300 juanojn. Tio kreis bonajn kondiĉojn por montregionaj amasoj en ilia konstruado de malgrandaj hidroelektraj. Multaj komunumoj kaj brigadoj de Kinglong-gubernio nun jam konstruis tian malgrandan hidroelektron.

IV

La sukceso de produkto de malgrandaj akvoturbinatoj tiris al si atenton de diversaj lokoj de nia lando. Leteroj petantaj desegnaĵojn aŭ specimenojn de malgrandaj akvoturbinatoj alflugis de diversaj lokoj kvazaŭ neĝflokaj, kaj la kabinetoj de la esplora grupo ofte estas plenigitaj de konsultantoj.

Laŭ peto de tibetaj koncernaj fakoj, la partia komitato de la instituto sendis Ĝang

Ŝouĵan kaj Si Liangĝaŭ al Tibeto por instrui teknikon pri fabrikado de malgrandaj akvoturbinoj kaj doni helpon en konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj.

Ili unuafoje venis al la Tibeta Altebenaĵo 3,000-4,000 metrojn super la marnivelo, ne kutimiĝis al la medio de altebenaĵo, spiradis malfacile kaj ne povis bone dormi; al ili mankis apetito kaj la liphaŭtoj krevis pro sekeco. Akceptantoj admonis ilin unue ripozi semajnon kaj eklabori post akomodiĝo al la loka klimato, sed ili diris: “Ni havas la taskon plenumi la esperon de la tibeta popolo, kaj ni povas venki tiujn malfacilojn!” Pro ilia persista postulo, en la sekvanta tago ili venis en fabrikan kaj komencis fabrikaci akvoturbinojn kune kun tieaj tibetanoj kaj ĉinaj laboristoj. Post 5-taga klopodo hidroturbino kun kapacito de 5.5 kilovatoj estis sukcese fabrikita. Ankaŭ la laboristoj ellernis la teknikon de akvoturbino.

Por instali la malgrandan akvoturbinan generatoron ili venis al la vilaĝo Gjuemugoŭ. Informiĝinte pri la konstruo de elektrejo, ĉiuj vilaĝanoj, sen distingo de sekso kaj aĝo, venis labori sur la konstruejo. Ĝang Ŝouĵan kaj Si Liangĝaŭ estis profunde emociitaj de ilia sinforĝesa spirito en la laborado kaj ankaŭ jetis sin en la konstruan laboradon, forgesinte sian laciĝon. En la tago de lanĉo de la elektrejo, la pli ol 80 familioj de Gjuemugoŭ ekhavis helan lumon. La ĝojkrioj “Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!” sonis tra la tuta montvalo. Ili kantis emocie:

Trinkante la dolĉan kaj klaran fontakvon,

Ni pensas pri l' fonto surmonta;

Vidinte la brilan elektran lamplumon,


Ni kantas pri suno la ruĝa.

Dum la restado en Tibeto ili ankaŭ faris enketon pri parto de etaj energiaj akvofontoj, surgrimpinte neĝmontojn kaj transpasinte glaciajn riverojn. Ili trovis ke en Tibeto preskaŭ ĉiuj montoj estas kovrataj de neĝo kaj ĉie troviĝas riveroj kaj lagoj kaj sennom-

braj akvofontoj. Kiom grandaj ŝanĝiĝoj okazos al Tibeto, se oni konstruos malgrandajn hidroelektrejojn en tiuj lokoj! Ili helpis la koncernajn fakojn difini multajn lokojn por elektrejoj kaj faris unuapaŝan planon por konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj.

La malgrandaj akvoturbinaj generatoroj portos lumon al la vastaj montregionoj de nia lando.

Esplorado pri malgranda hidroelektra generatoro.



Gubernia fabriko de agrikulturaj instrumentoj produktis grandan nombron da malgrandaj hidroelektraj generatoroj.



Kvin jaroj en kamparo

EN printempo de 1970, la Ditan-a Tuberkuloza Hospitalo de Pekino kie mi laboris, decidis translokiĝi en du nacimalplimultajn regionojn de Gansu-provinco, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **“meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon”**. La laborantoj de la hospitalo konkure sin anoncis por translokiĝi kun ĝi kaj ankaŭ mi kun mia tuta familio venis kaj fikslokiĝis en Vangatan de Hiahegubernio en la Tibetnacieca Aŭtonoma Subprovinco de Suda Gansu. Ekde tiam forpasis jam kvin jaroj kaj mi ricevis profundan edukon kaj havis ŝanĝigon en miaj pensoj kaj sentoj en servado al la vastaj amasoj de kamparanoj kaj paŝtistoj.

Mi estas intelektulo longe vivinta en la malnova Ĉinio, ricevis malnovan edukon kaj havis nenian sukceson en medicino antaŭ la Liberiĝo. Post la Liberiĝo la Partio kaj la popolo plurfoje sendis min al fakaj hospitaloj por lerni, kaj mi ekfaris esplorojn pri tuberkulozo kaj elmetis kune kun aliaj kamaradoj kreivajn proponojn pri kuracado de tuberkuloza meningito de infanoj. Pro tio la Partio kaj la popolo donis al mi multajn honorojn. Sed pro veneno de la kontraŭrevolucia reviziisma linio kaj neĝisfunda reformado de mia mondkoncepto la honoroj fariĝis balasto pezanta sur mi kaj mi komencis suriri eraran vojon de apartiĝo de praktiko, de la amasoj kaj de fizika laboro. La Granda Proleta Kultura Revolucio edukis min kaj mi komprenis ke por altigi min politike kaj ideologie, pli bone servi al la popolo kaj fari pli multe da kontribuoj en miaj lastaj jaroj de la vivo, mi nepre devas iri en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj longtempe, senkondiĉe kaj tutkore kaj iri al plej malfacilaj lokoj por min reformi kaj

hardi. Ĝuste kun tia sinteno mi kaj mia familio venis al Vangatan.

En la komenca periodo post mia alveno al la nomita loko mi opiniis ke la kamparo, al kiu mankas kaj kuracistoj kaj medikamentoj, tre bezonas min. Sed nun mi komprenas ke mia antaŭa kono estas nesufiĉa. Mi ofte diras: “Vangatan bezonas min, sed mi pli bezonas tieajn kamparanojn kaj paŝtistojn.” Ĉar mi bezonas ĉerpi de ili politikan nutraĵon por pluapase reformi mian mondkoncepton.

Dum la rondira kuracado en la kamparo kaj en la paŝt-regiono mi estis kortuŝita, kiam mi vidis ke la laboremaj kaj bravaj kamparanoj kaj paŝtistoj konstruas ŝtuparajn kampojn kaj paŝtas bovojn kaj ŝafojn en neĝo kaj frosto por pli multe kontribui al socialismo. La patrino de tibetana knabino Badmaco malsaniĝis, mi kuracis, flegadis ŝin pli ol 20 horojn ĉe ŝia lito kaj resanigis ŝin. Pro tio niaj ambaŭ familioj interamikiĝis. Iun tagon Badmaco venis al Vangatan por vendi lanon por sia brigado, sed kiam ŝi finprenis manĝon ĉe ni kaj estis preta hejmeniri, subite ekpluvegis. Ni petis ŝin tranokti ĉe ni, sed ŝi rifuzis pro zorgo al la kolektiva ŝafaro kaj malgraŭ la pluvo revenis al sia brigado. Ŝia revolucia spirito donis al mi grandan edukon. El tio mi ekkonis, ke estas la laboranta popolo kiu kreis la materian kaj spiritan havaĵon, kaj ke ĝi estas la vera kreanto de la historio. Ŝia spirito akre kontrastas kun mia antaŭa strebo al famiĝo.

Vangatan staras je pli ol 2,700 metroj super la marnivelo. Pro maldenseco de la aero mi suferis seriozan altmontan malsanon en la unuaj tagoj post alveno al la loko kaj ofte ne havis apetiton kaj malbone dormis. Poste mi eksuferis de alta sangpremo. Por

tie fiksloĝi kaj revolucii dum la tuta vivo mi devas adaptiĝi al la tiea medio, tial mi kaptis ĉiujn okazojn por min hardi. Kiam mi faris rondiran kuracadon, anstataŭ veturi mi piediris kaj montgrimpis por min ekzerci. Dejorante en la hospitalo mi elpremis tempon por fari purigadon kaj partopreni en fiziklaboro farebla por mi. Ĉiutage mi persiste hardis min korpe per longdistanca kurado. Iuj demandis min: “Maljuna doktoro, ĉu vi povas kutimiĝi al la vivo de nia loko?” Mi diris: “La tibetanaj amasoj vivas ĉi tie de generacio al generacio. La pli ol 300,000 popolanoj de suda Gansu-provinco povas vivi ĉi tie, do ankaŭ mi povas alkutimiĝi. Kiel revoluciulo mi ne devas postuli, ke la revolucia medio adaptiĝu al mia korpo, sed devas memkonscie min reformi por adaptiĝi al la revolucia medio.” Nun mi jam fundamente alkutimiĝis al tiea medio, malle-

vigiis mia sangopremo kaj altiĝis mia kapablo de piedirado kaj montgrimpado.

La transloĝiĝo de Pekino al la stepo de suda Gansu-provinco signifas grandan progreson por mi, tamen se ne solviĝus la problemo kun kia sinteno labori, mi ankoraŭ ne povas bone servi al la popolo.

Mi ofte pensis: kia diferenco estas inter la kuracistoj de la nova Ĉinio kaj tiuj de la malnova? Kvankam ĉiu kuracisto senescepte laboras por kuraci malsanulojn nun kaj antaŭe, tamen en la socialisma socio kuracistoj servas al la popolo, dum en la malnova Ĉinio kuracistoj servis nur al la malmultaj bienuloj kaj burĝoj. Tio estas la esenca diferenco. Tial Prezidanto Maŭ foje-refoje instruas al ni ke oni nepre devas solvi la problemon al kiuj servi. Foje mi ekzamenis kaj preskribis al iu malsanulo suferanta de

Gang Sijong (la 2-a de dekstre) inter malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaĵ mezpaŝtistoj



kapdoloro. En la sekvanta tago mi kun plena memfido demandis al li: “Kiel vi fartas? Pli bone, ĉu ne?” Sed la malsanulo plendis: “Ne, eĉ pli malbone!” Aŭdinte liajn vortojn mi iom malĝojis kaj diris: “Niaj kurackondiĉoj estas malbonaj, bonvolu iri al Lanĝou (la ĉefurbo de Gansu-provinco) por kuraci.” Nokte mi multe pensis pri tio. Mi konsciis ke kiel kuracisto mi ne bone plenumis mian devon al la malsanulo. Tio montris ke mi ankoraŭ ne efektive solvis la problemon al kiuj servi kvankam mi venis al la kamparo. Je la sekvanta frua mateno mi revenigis la malsanulon de la fervoja stacio kaj petis de li pardonon. Poste mi faris al li ĉiuf flankan ekzamenon kaj konstatis ke li suferis de altebenaĵa malalta sangpremo. Antaŭe mi neniam kuracis tian malsanon, mi do foliumis diversajn librojn kaj koncernajn materialojn en sep sinsekvaj noktoj kaj elmetis novan kuracmetodon laŭ la sperto notita en la libroj kaj mia observado. Post duonmonata zorgema kuracado la malsanulo resaniĝis. Poste mi aplikis la metodon al kelkcent kazoj kun bona efiko.

La menciita afero multe edukis kaj inspiris min. Mi aranĝis en mia domo “ekzamenan liton” por ĉiam esti preta fari ekzamenon al malsanuloj post reveno de laboro en la hospitalo. Kiam mi servas al la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj mi ne pensas, ke ili venis al mi por peti mian helpon, sed rigardas ilin kiel klasajn fratojn kaj ĉiamaniere klopodas por resanigi ilin. Tia klasa sento povas esti formita nur en longa procedo de alproksimiĝo al la amasoj.

Nia hospitalo en Vangatan ne havis sango-konservejon. Se estas necese transfuzi sangon al danĝera malsanulo, ni ĉiuj memvole oferis sangon. Iuj admonis min ne tion fari pro mia maljuneco, tamen por savi la vivon de klasaj fratoj mi du fojojn oferdonis mian sangon. Krome mi persvadis miajn gefilojn ankaŭ tion fari. Kiam bebo suferis de akuta pulmito kaj estis necese fari spiradon al ĝi buŝo al buŝo, mi faris tion kune kun aliaj kamaradoj. Mi opinias, ke tio ne estas problemo de kuracarto sed problemo ĉu oni

povas tutkore servi al la popolo aŭ ne. Se al kuracisto mankas tia sento al klasaj fratoj, li estas neniom utila por la popolo eĉ kun alta kuracarto.

Kompreneble, kuracarto estas tre grava por kuracisto. Sed, kiel oni povas en sia laboro fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn? Laŭ mi, la ŝlosila problemo estas ke oni devas havi fortegan deziron servi al la popolo. Kun tiu deziro oni povas havigi al si saĝon kaj kapablon en praktiko kaj altigi sian teknikon. Praktiko de pli ol kvin jaroj en la kamparo de suda Gansu-provinco elmetis al ni multajn novajn esplorajn temojn. Kunlaborante kun la kamaradoj mi faris esplorojn kaj trovis iujn leĝojn kaj skribis 6 disertaĵojn rilate al kuracado de altebenaĵa malalta sangpremo, kronika renito, toksa dispepsio de infanoj, akuta pulmito de beboj novnaskitaj kaj malgrandaj, akra manko de oksigeno kaŭzita de skrofolo ĉe pulma hilo kaj traĥea fistulo de infanoj. Nova kuracmetodo de altebenaĵa malalta sangpremo estis eltrovita de mi kaj miaj kamaradoj en la praktiko kaj havas bonan klinikan efikon. En la komenco ni konigis buŝe al ĉiuj, kiuj volas scii la terapion kaj poste presigis tekston pri ĝi kaj donis aŭ poŝte sendis ĝin al ĉiu petanto. Ni opinias ke en la socialisma Ĉinio ĉiu ajn scienca atingo estas frukto akirita sub la gvido de la Partio kaj subtenado de la amasoj, sed ne privata posedaĵo.

En la lastaj jaroj en ligo kun la kuracaj laboroj mi jam legis filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong kiel *Pri Praktiko*, *Pri Kontraŭdiroj*, *Problemo pri Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj ankaŭ verkojn de Marks kaj Lenin. Tio multe helpis por reformi mian mondkoncepton kaj direkti mian praktikan laboron. En 1973 kiam mi fariĝis 64-jara mi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Nun mi estas ankoraŭ sana kaj energia, mi nepre energie lernos kaj laboros por firmigi la proletaran diktaturon kaj dediĉos miajn lastajn jarojn al la higiena laboro de tibetnaciecaj popolanoj.




Intima interparolado sur Songhua-rivero

de SONG JOŬ

LA Maŭritania Higiena Delegacio kun Abdallahi Ould Bah, ministro de higienaj kaj sociaj aferoj, kiel ĉefo vizitis Ĉinion en aŭgusto de la kuranta jaro. Iun tagon, la honorindaj gastoj intime interparoladis en jakto sur Songhua-rivero kun antaŭaj membroj de ĉina medicina grupo, kiuj laboris en Maŭritanio.

Ekde la jaro 1968, Ĉinio sendis el Hejlonggiang-provinco unu post alia ses medicinajn grupojn kun sume pli ol 170 personoj al Maŭritanio por tie labori. La membroj de la ĉinaj medicinaj grupoj starigis tie profundan amikecon kun la maŭritania popolo. Atinginte Ĉinion, la Maŭritania Higiena Delegacio tuj

postulis veni al Harbin por vidi siajn malnovajn amikojn. Venis la tago, en kiu la maŭritaniaj gastoj venis al la hejmloko de la ĉinaj medicinaj grupoj kaj ĝoje kunestis kun la ĉinaj malnovaj amikoj. Sur la jakto la ĉinaj medicinaj laborantoj detale demandis al la gastoj pri la vivo kaj laboro de maŭritaniaj medicinaj laborantoj. La maŭritaniaj amikoj komunikis la sopiron kaj salutojn de maŭritaniaj medicinaj laborantoj al iliaj ĉinaj kolegoj. Vidinte Maŭ Ŝulin, vicedron de la Unua Hospitalo de Harbin, Ministro Bah varme premis liajn manojn kaj intime demandis lin: “Ĉu vi tute resaniĝis?” Kaj la lasta diris kun rideto: “Vidu, ĉu mi ne tute resaniĝis?” Maŭ Ŝulin estis vicedro de la unua



Maŭritania amiko kaj kamarado Maŭ Ŝulin dum ekskurso sur Songhua-rivero

Ĉina medicina grupo sendita al Maŭritanio en 1968. La intima saluto de Ministro Bah rememorigis al li la profundan zorgon de la maŭritaniaj registaro kaj popolo al li kaj la aliaj membroj de la ĉina medicina grupo. Foje Maŭ Ŝulin en malsano persistis rondiran kuracadon en dezerta regiono kaj sur vojo li subite falis en lokan akutan malsanon kaj forte febris, la haŭto de lia tuta korpo flaviĝis. Li estis en danĝero kaj bezonis urĝan helpon. Sed en la dezerta regiono la ĉefaj trafikiloj estas kamelo kaj azeno. Lokanoj tuj raportis la akcidenton al sia supera instanco kaj la distriktestro tuj petis helpon de la ĉefurbo Nouakchott kaj la lasta ĝustatempe alsendis kuracilojn per speciala aviadilo. Dank' al zorga kuracado kaj flegado de maŭritaniaj kaj ĉinaj medicinaj laborantoj, Maŭ Ŝulin rapide resaniĝis. Sur la jakto Maŭ Ŝulin diris al Ministro Bah, ke kvankam ili jam revenis al Ĉinio, tamen ili neniam forgesos la zorgon kaj helpon de la registaro kaj popolo de Maŭritanio al la ĉinaj medicinaj grupoj.

La membroj de la ĉinaj medicinaj grupoj klare memoras ke ĉiufoje kiam Prezidanto Daddah faris inspektadon, li vizitis ilin senescepte. La varma prizorgo de la maŭritaniaj registaro kaj popolo al la ĉinaj medicinaj grupoj montris la profundan amikecon inter la popoloj de ambaŭ landoj.

Maŭritanio stiuas en la okcidenta parto de Saharo de Afriko. En la dezerta regiono la temperaturo estas relative alta kaj akvo estas tre kara. Foje en varmega sezono, la medicina grupeto el maŭritaniaj kaj ĉinaj medicinaj laborantoj faris rondiran kuracadon en Nema-paŝtregiono. Survoje la aŭto subite paneis, la ses personoj en ĝi ĉiuj jam sentis soifegon, sed restis ĉe ili nur duonbotelo da akvo. Vidinte ke la liphaŭto de la ŝoforo krevis pro sekegeco, ĉina kuracisto donis al li la botelon por ke li trinku. Sed la ŝoforo rifuzis dirante: "Mi estas indiĝeno kaj jam kutimiĝis al tio. Vi trinku!" Li senhezite remetis la botelon en la manojn de la ĉina kuracisto. La botelo pasis de homo al homo

La maŭritania delegacio vizitas la infanan parkon.



sed neniu volis trinki, kaj ili rezervis ĝin por malsanulo. Vindinte ke la soifego turmentas la ĉinajn kuracistojn, la ŝoforo tre maltrankviliĝis kaj li malgraŭ varmego kaj laco foriris sola por serĉi akvon dum la aliaj ripozis. Rimarkinte la malaperon de la ŝoforo, la ĉinaj kuracistoj ĉiuj tre maltrankviliĝis kaj tuj komencis serĉi lin. Fine en loko pli ol 20 kilometrojn fora ili trovis la ŝoforon, sed jam kuŝantan en sveno sur sablo. La ĉinaj kuracistoj tuj portis lin al proksima kuraca stacio por lin savi. Kiam la ŝoforo rekonsciigis, li unue demandis: “Kiel fartas la ĉinaj kuracistoj?” Lia vorto plena de profunda amikeco kortuŝis kaj edukis la ĉinajn kuracistojn.


Ili rememoris, ke ĉiufoje kiam nombro da ĉinaj kuracistoj revenis al la hejmlando, multaj maŭritaniaj amikoj alrapidis de malproksime por adiaŭi ilin. Okaze de adiaŭo al ĉinaj kuracistoj, iu laboristo de Aioun-distrikto faris, tuj en la nokto, delikatan latunan marteleton, sur kiu li gravuris en la araba

lingvo “vivu la amikeco inter la popoloj de Maŭritanio kaj Ĉinio!” Kiam li prezentis tiun donacaĵon al la ĉinaj kuracistoj, li diris, ke la malgranda latuna martelo simbolas la firman volon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko en la batalo kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo, kaj petis ke li portu ĝin al Pekino.

Sur la jakto, la medicinaj laborantoj de la du landoj intime interparoladis kun ĉiam kreskanta ĝojo. Por laŭdi profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Maŭritanio, du ĉinaj kuracistoj improvizis kanton kaj ĝin prezentis al la amikoj:

*Sur ambaŭ bordoj de Songhua pompas
buntaj floroj.
Amikoj la maŭritaniaj venas jen de dek-
mil-lia foro.
La solidara kunbatalo portis al ni
amikecon,
kaj man-en-mane marŝas ni antaŭen kun
memfida koro.*

Vizito al la epidemio-preventa stacio de Hejlonggiang-provinco



GASTOJ EL MALPROKSIMA LANDO

La septembraj tagoj de Pekino estas serenaj kaj ĉarmaj. En tiuj belegaj tagoj ni akceptis kun granda plezuro gastojn el malproksima lando — du usonajn esperantistojn, s-ino Minerva Rees kaj s-ro Paul Stein. Ili portis profundan amikecon de usonaj esperantistoj al ĉinaj esperantistoj.

La gesinjoroj vizitis Ĉinion kiel membroj de la Usona Delegacio "Amikoj de Ĉinio". S-ino Rees transdonis al la Ĉina Esperanto-Ligo tri leterojn respektive de s-ro W. R. Harmon, prezidanto de la Esperanta Ligo de Norda Ameriko (ELNA), s-ro G. Rodenborn, prezidanto de la San-Franciska Esperanta Regiona Organizaĵo (SFERO), kaj s-ro W. H. Schulze, direktoro de la Esperanta Informa Centro (EIC) kaj usona peranto por nia gazeto *El Popola Ĉinio*. En siaj leteroj, tiuj usonaj amikoj varme esprimis amikecon, bondezirojn de ili mem kaj aliaj usonaj esperantistoj al ĉinaj esperantistoj kaj komplimentojn pri EPC.

Vespere de la 13-a de septembro la redakcio de *El Popola Ĉinio* okazigis en la Pekina Hotelo te-kunvenon por varme bonvenigi s-inon Rees kaj s-ron Stein. La geesperantistoj de la du landoj intime interparolis, kaj gajeco ĉiam regis en la salono. La usonaj gastoj demandis pri la Espe-

ranta movado en Ĉinio, kaj laborantoj de la redakcio petis de ili opiniojn pri la revuo kaj dankis ilin pro ilia valora propono. Dum la kunveno, la dulandaj geesperantistoj fotiĝis kune kaj donis donacajojn unu al alia. Ilia vizito donis neforgeblan impreson al la laborantoj de la redakcio de *El Popola Ĉinio*.

Dum sia restado en Pekino, s-ino Rees kaj s-ro Stein estis invititaj same kiel alilandaj amikoj al la inaŭgura ceremonio de la Tria Tutlanda Sporta Konkurso de la Ĉina Popola Respubliko kaj rigardis tie la amasan gimnastikon titolitan *Himno al la Ruĝa Flago*. En Pekino ili vizitis fabrikon, popolan komunumon kaj lernejon kaj rigardis pekinajn vidindaĵojn kaj historiajn restaĵojn. Ĉie, kien ili venis, ili estis varme bonvenigataj de la ĉina popolo. S-ino Rees admiris la belecon de Pekino, komplezemon de ĉinoj kaj ilian feliĉan vivon. Ili forlasis Pekinon je la 17-a de septembro por viziti aliajn lokojn de nia lando.

S-ino Rees kaj s-ro Stein estas la unuaj usonaj esperantistoj, kiuj vizitis Ĉinion kaj renkontiĝis kun laborantoj de la redakcio de *El Popola Ĉinio*. Ilia vizito certe akcelos la interkompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Usono.



Vizito al blindula fabriko

GEAMIKOJ, ĉu vi legis la artikolon “Solvo de senlaboreco en la nova Ĉinio” publikigitan en la 1-a numero de nia gazeto en tiu ĉi jaro? El tiu artikolo vi povas scii, ke la nova Ĉinio tute solvis la problemon de senlaboreco. En nia lando la Partio kaj la registaro donas laborŝancojn ankaŭ al blinduloj, surduloj, mutuloj kaj aliaj kripluloj. Por krei laborkondiĉojn al ili, la registaro fondis lernejojn por blinduloj, surduloj kaj mutuloj en nemalmultaj lokoj de la tuta lando, funkciigas fabrikojn konformajn al iliaj fiziologiaj kondiĉoj kaj asignas al ili fareblajn laborojn.

Antaŭ nelonge, ni vizitis la Tiangin-an Metalajn Fabrikon Ĉongguang por blinduloj. Kiam ni eniris en ĝin, ni vidis, ke laboristoj, kiuj finis sian labordejonon, gaje eliris duope aŭ triope, man-en-mane el laborejoj. Kiu povis imagi ĉe tio, ke ili estas blinduloj?

En la oficejo de la fabriko, Sun Ŝujong, estro de la revolucia komitato de la fabriko, prezentis al ni la staton de la fabriko. Li diris: “Nia fabriko estis fondita en la jaro 1958. Nun ĝi havas 396 laboristojn kaj oficistojn, inter kiuj troviĝas 127 blinduloj, 6 surdmutuloj kaj 9 kripluloj. La fabriko konsistas el 5 laborejoj kaj ĝiaj ĉefaj produktaĵoj estas biciklaj spokoj kaj diversaspecaj latunaj maŝinpartoj.

Kamarado Sun diris al ni, ke antaŭ la Liberiĝo, la blinduloj el laborulaj familioj devis sin vivteni per almozetado kaj kantado sur stratoj, kaj tuttage baraktis kun la Morto. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ŝtato tute povas vivteni la kriplulojn, tamen por havigi al ili la ŝancon por partopreni en la socialisma konstruado kaj fari ilin sendependaj laboruloj, la socialisma nova Ĉinio kreis kondiĉojn al tiuj, kiuj ne tute perdis laborkapa-



En laboro

blon, kaj helpis ilin ellerni produktajn teknikojn, tiel ke ili povas kontribui al la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado. Same kiel aliaj blindulaj fabrikoj, la nomita fabriko speciale instalas malgrandajn maŝinojn de blinduloj, por ke ili povu manipuli maŝinojn kaj fariĝi teknikaj laborantoj.

Ni ne povis imagi, kiel blinduloj povas manipuli ilmaŝinojn. Kamarado Sun ĝoje diris: “Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj, bonvolu iri en laborejon por rigardi!”

En la vasta kaj hela laborejo, ĉiu blinda laboristo sidis ĉe ilmaŝino unu metron longa. Ili metis latunan materialon sur tenilon kaj funkciigis la maŝinojn. Kiam la laboro estas finita, la maŝinoj mem haltis. Kun la lerta manipulado de blinduloj, ore brilaj ŝraŭbintoj estis elproduktitaj. Ni vidis, ke al ĉiuj maŝinoj speciale uzataj de blinduloj estas instalitaj sekurigaj ekipaĵoj. Kaj krome, en ĉiuj laborejoj kaj skipoj estas pluraj laboristoj sen korpaj difektoj, kiuj respondecas pri riparado kaj renovigo de maŝinoj kaj helpado al blindaj fratoj. De la fondiĝo de la fabriko ĝis nun, en ĝi neniam okazis akcidento, kaj la kvalito de ĝiaj produktajoj estas bona.

En la laborejo, ni havis interparolon kun veterana blinda laboristo Liu Jongĉang, kiu ĵus revenis de Bejdajhe — bona loko de nialando por trasomerumi. Kun sunbruna vizaĝo li aspektas ankoraŭ pli sana.

Maljuna Liu naskiĝis en malriĉa laborista familio. Kiam li aĝis 6 jarojn, liaj okuloj suferis akutan konjunktiviton. Tiam ili eĉ ne havis rimedon por plenigi la stomakon, por ne paroli pri mono por kuracado. La brule maltrankviliĝintaj gepatroj nenion povis fari por savi la infanon de blindiĝo.

En la hommanĝa malnova socio, eĉ sanaj homoj sin trovis en senelirejo, por ne paroli pri blinduloj. Tiam Liu Jongĉang ĉiutage almozpetadis kunportante difektan vazon kaj estis multe insultita kaj turmentita. Kiam ni demandis pri la nova vivo de blinduloj post la Liberiĝo, li diris: “Prezidanto Maŭ nin savis el fajrego, kulturis nin en teknikajn laboristojn, kiuj ricevas salajron same kiel

sendifektaj laboristoj. Sub la zorgo kaj edukado de la popola registaro, la vasta amaso de blinduloj levis sian klerecon kaj politikan konscion kaj iuj el ili aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En nia fabriko, pli ol dek blinduloj funkcias kiel gvidantoj de la fabriko, laborejoj aŭ skipoj. Ankaŭ mi estis multfoje elektita kiel labormodelo de Tiangin kaj funkcias kiel unu el la gvidantoj de la fabriko kaj laborejo.”

En la fabriko, multaj blindaj gejunuloj enamiĝis unu al alia en kuna laborado kaj fondis feliĉajn familiojn post geedziĝo. Kamarado Liu akompanis nin viziti la familion de laboristino Ĝu Jufen


Ĝu Jufen varme akceptis nin. Ŝi diris: “En la nova Ĉinio, ni blinduloj ne plu estas balasto de la socio, sed estas utilaj por ĝi. Ni rigardas kiel la plej grandan feliĉon tion, ke ni povas kontribui al la socialisma konstruado.” Ĉe tio, venis knabino kun du harligetoj. Ĝu Jufen diris al ni ke la knabino estas ŝia filino Ĝang Hujgjun, elementlernejano de kvara klaso. Hujgjun kun paro da brilaj grandaj okuloj kaj ruĝaj vangoj, estas tre vigla, sana kaj aminda. “Kiam Hujgjun estis trijara,” daŭrigis Ĝu Jufen, “ŝi malsaniĝis kaj ŝiaj okuloj ne povis malfermiĝi pro forta febro. Mi kaj ŝia patro brule maltrankviliĝis. Ĝuste tiam informiĝinte ke mi kaj mia edzo estas blindaj kaj estas malfacile por ni porti la infanon al hospitalo, kuracistoj de la sanitarejo meminciate venis 2-foje en ĉiu tago al nia hejmo por kuraci, nutri kaj lavi vestaĵojn por la knabino. Ili tiel klopodadis pli ol dek tagojn ĝis resaniĝo de la infano. Ni vere ne sciis kiel ilin danki!”

Tiam mi prenis la manon de Hujgjun kaj demandis ŝin ĉu ŝi ankoraŭ memoras sian malsaniĝon. Ŝi diris: “Mi jam forgesis, tamen mia patrino ofte rakontis al mi kiel ŝi blindiĝis en la aĝo de tri jaroj pro forta febro kaj manko de mono por kuraco. Ankaŭ mi febris en la aĝo de tri jaroj, tamen pro tio, ke mi vivis en la nova Ĉinio, mi ricevis zorgeman kuracadon kaj flegadon kaj rapide resaniĝis. Nia tuta familio kore dankas Pre-

zidanton Maŭ pro la feliĉo donita de li al ni." Ni ĉiuj kapjesis pretervole.

Tiam, iu kamaradino eniris en la ĉambron kaj varme salutis Ĝu Jufen. Poste ni sciis, ke ŝi estas vendistino en proksima grenvendejo Li Ĝenjing. Por helpi la blindajn laboristojn kaj oficistojn, kamaradoj de la grenvendejo ĉiumonate portas grenon al iliaj hejmoj akurate, kaj tiuj de butikoj de flankmanĝaĵoj kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj kaj kudrejo ofte iras al iliaj hejmoj por servado. Kaj la najbaroj ĉiam etendas manon por helpi ilin solvi malfacilojn. Tio plene montris la novan rilaton inter homoj en la socialisma socio.

Homoj, kiuj trapasis frostan vintron, plej bone scias la varmon de la suno. La laboristoj kaj oficistoj de la nomita fabriko, kiuj varme amas la novan socialisman Ĉinion, plenenergie entreprenas produktadon kaj revolucion kaj ilia fabriko estas unu el la avangardaj unuoj de Tiangin en lernado de Daking. En la jaro 1974, la totala produktov valoro de la fabriko kreskis je 1.62-oblo kompare kun tiu de la jaro 1965 antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. En la unua duono de la kuranta jaro, la fabriko superplenumis sian taskon.



Studo de politika teorio



Prezentado de muzikaj amatoroj

Post labordejoro laboristoj hejmen iras.



Ho, samsangaj fratoj niaj en Tajvan

Kun profunda amo, iom malrapide

Vortoj de Ju Zonghin

Muziko de Ĝaŭ Bang



Mi ri- gar- das ĉe l' mar- rand' for al



Taj- van de la pa- tro- land'. En mi- a ko- ro on- das Ĵi- jue-



tan*, bru- as ar- ba- roj sur A- li- mont- gi- gant'. Ho, sam-



san- gaj fra- toj ni- aj en Taj- van, ni en



tag' kaj nok- ta ho- ro pen- sas pri vi kun zor- go en la

Emocie, rezolute, duoble pli rapide



kor'.

Ho,



la po- pol' de l' tu- ta land' al sa- ma ce- lo



stre- bas for- te kun u- nu- a- ni- ma vol':



Taj- van al pa- tro- land' re- ve- nu nun, ke la su- no



bri- lu su- per ĝi per la ra- di- oj de or'!



Ne- ba- re- blas re- vo- lu- ci- o, cer- te ni- aj



Taj- van- aj fra- toj ku- ni- ĝos kun ni en ĝoj'. Li- be-



ri- gos ni ne- pre Taj- van, kaj la sun- ra- di- oj de fa-



vor' bri- le- gos su- per ĝi en glor'

* La plej jama tago de Tajvan

Kiel ni verkis la kanton

“Ho, Samsangaj Fratoj Niaj en Tajvan”

LA kanto *Ho, Samsangaj Fratoj Niaj en Tajvan* estas kune verkita de Ju Zonghin kaj mi; li verkis la vortojn kaj mi la muzikon. En la pasintaj 4 jaroj post la naskiĝo de la kanto en 1972, ni ricevadis kuraĝigojn de vastaj amasoj, precipe de tajvan-aj samlandanoj kaj ĉinaj patriotaj elmigrintoj. Multaj el ili skribis al ni, ke ili deziregas ricevi la kanton kun notoj kaj diskon de ĝi. La kanto povis ricevi atenton de ili, precipe ŝaton de tajvan-aj samlandanoj, pro tio, ke ĝi spegulas la komunan senton de la tuta ĉina popolo, inkluzive de niaj samlandanoj en Tajvan-provinco, kaj esprimas la profundan amon de la centoj da milionoj da popolanoj de la patrolando al la 16 milionoj da tajvan-aj samlandanoj. Mi sentas senkomparan feliĉon kaj gloron, ke mi, ordinara literatura kaj arta laboranto, povis fari kontribuon per la kanto al la sankta afero de liberigo de Tajvan por unuigo de la patrolando.

Antaŭ longe, ĉe ni ambaŭ jam naskiĝis inŝpiro al verkado de la kanto. Mi naskiĝis en Lingŝan-gubernio de Guangdong-provinco. En mia infaneco, mi ofte aŭdis de maljunuloj pri transloĝiĝo de niaj samlokanoj al Tajvan-provinco, reveno de tajvan-anoj por viziti siajn parencojn kaj tragikaj travivaĵoj de tajvan-aj samlandanoj post kiam la japanaj agresantoj okupis Tajvan. Ĉio tio stampis en mian infanan koron senkomparan malamon kontraŭ la agresantoj kaj senliman simpatian al la tajvan-aj samlandanoj. Precipe post la liberiĝo de la ĉeftero de la patrolando, Tajvan fariĝis, sub la kruela regado de la kliko de Ĉiang Kajŝek, paradizo por riĉuloj kaj infero por malriĉuloj. Ĝia socio putras, ĝia kamparo bankrotas, ĝia ekonomio malpros-

peras, ĝiaj prezoj fluge altiĝas kaj la popolo tie vivas pli kaj pli mizere. Ĉio tio ofte rememorigas al mi la dolorplenan historion de mia familio en la malnova socio. Mi klare memoras, ke mia frato aliĝis al gerila taĉmento de la Kompartio kiam mi estis 12-jara kaj malfeliĉe li estis kaptita kaj enkarcerigita de la kuomintangaj reakciuloj; mia patro estis kruele batita de tiuj banditoj, grave malsaniĝis kaj baldaŭ mortis en indigno, pro manko de mono por kuracado kaj sopiro al mia frato en malliberejo. Post lia morto, mi ne havis vivrimedon kaj formigris sola aliloken kaj povis renkontiĝi kun la familianoj nur post la Liberiĝo. Estas la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj savis min kaj dank' al kies flegado mi povis viziti universitaton, glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj fariĝis literatura kaj arta laboranto. Komparante la pasintecon kun la hodiaŭo, kaj la tragikan vivon de la tajvan-aj samlandanoj kun la feliĉa vivo de la popolo sur la ĉeftero de la patrolando, mi sentas ankoraŭ pli profundan simpatian al la samsangaj fratoj en Tajvan kaj ankoraŭ pli ardiĝis mia inŝpiro por verkado.

En 1971, la leĝa sidloko de nia lando en UN estis restarigita kaj la naciperfida kliko de Ĉiang Kajŝek estis forpelita el ĝi, kio deklaris bankroton de la intrigo de plenmano da internaciaj reakciuloj en kreado de “du Ĉinioj” kaj “unu Ĉinio kaj unu Tajvan”. Ricevinte tiun ĝojindan informon, mia koro tuj flugis trans altajn montojn, trans la maron al la tajvan-aj samlandanoj. Forta deziro de unuigo de la patrolando kaj frua rekuniĝo de la popolo ondas en mia menso kaj plifirmiĝis mia memfido en verkado. Mi do komencis

kune kun kamarado Ju Zonghin formi kon-
turojn de kanto en strikta kunlaboro kaj in-
terkonsiliĝado. Ni studis la geografion, kuti-
mojn kaj aktualan staton de Tajvan kaj
foliumis multajn materialojn kaj muzikaĵojn
pri ĝi. Ni faris plurajn projektojn, ilin studis
unu post alia en detalo kaj fine decidis la
temon *Ho, Samsangaj Fratoj Niaj en Tajvan*.
Por ke la kanto sonu kortuŝe, ni elektis la
formon de solo.

*Mi rigardas ĉe l' marrand'
for al Tajvan de la patroland'.
En mia koro blue ondas Ĵijuetan,
bruas arbaroj sur Ali-montgigant'.
Ho, samsangaj fratoj niaj en Tajvan,
ni en tag' kaj nokta hor'
pensadas pri vi kun zorgo en la kor'.*

.....

Kamarado Ju Zonghin rapide verkis la
vortojn. En profunda nokto, kiam mi prenis
plumon por verki muzikon por la vortoj,
aperis antaŭ miaj okuloj kortuŝaj scenoj, kiel
tajvan-aj samlandanoj sopiras al la patro-
lando kaj kiel ili deziregas reveni en la sinon

de la patrolando. Informiĝinte el radiorice-
vilo pri la prospera konstruado de la patro-
lando, iu tajvan-a samlandano diris emocie:
“De pli ol cent jaroj, la ĉina popolo multege
sufervis de tiranado de imperiismo, kaj ekhavis
liberon kaj feliĉon nur sub la gvido de la
Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ!” Alia
tajvan-a samlandano diris kun larmoj: “Nun
Tajvan jam sufiĉe multe sufervis de la kuo-
mintangaj reakciuloj kaj ni tajvan-aj popola-
noj ĉiam deziras liberigon!” Pensante pri tio
mi sentis, ke mia koro ondadis kiel maro,
larmoj plenigis miajn okulojn kaj mi finver-
kis la muzikon de la kanto tuj en tiu nokto.

La malneto de la kanto tuj ricevis koran
prizorgon de vastaj amasoj de laboristoj,
kampanoj kaj soldatoj, kiuj elmetis opiniojn
por rebonigo, kaj tajvan-aj samlandanoj en
Pekino speciale kunvenis por ĝin plibonigi
en detalo, tiel ke la vortoj fariĝis pli emociaj
kaj ĝustaj. Tio manifestis la komunan volon
kaj komunan voĉon de la vasta popolo sur la
ĉeftero. Kvankam la kanto estas verkita de
ni du, sed fakte ĝi estas komuna verko de la
saĝo de la amasoj.



SUKCESIS EKSPERIMENTO DE KULTURO DE RIZPLANTIDOJ EN SEKA KAMPO

En la lastaj jaroj, la kultura areo de
rizo en la ĉirkaŭurbo de Pekino pli kaj
pli grandiĝis, sed pro malmulteco de
pluvo en la lastaj jaroj oni ne povas akiri
sufiĉe da akvo por altigi produktokvan-
ton de rizo. Por solvi tiun problemon,
la laborantoj de la Agronomia Akademio

de Pekino organizis, kune kun kadroj kaj
membroj de lokaj komunumoj kaj briga-
doj, grupon de scienca eksperimento. La
grupo provis novan kulturen metodon de
rizplantidoj, akomode al la loka natura
kondiĉo — sekeco en printempo kaj pluv-
abundo en somero. La grupo kulturis
rizplantidojn en seka kampo printempe
kaj irigaciis ilin somere. Tiu eksperi-
mento jam ricevis unuapaŝan sukceson.
En la pasinta jaro la meznombra hektara
produktokvanto de rizo atingis 6,915 kg.,
kaj oni povas rikolti meznombre en ĉiu
hektaro 9,150 kg. da greno se oni tiel
kulturis rizon inter linioj de vintre se-
mita tritiko.



La benglung-oj

de ZONG MIN

LA benglung-a nacieco nombras pli ol 7,000 membrojn, el kiuj plejparto loĝas en la sudokcidenta parto en Junnan-provinco de nia lando. Pli ol 75% de la benglung-oj dislokiĝas en la gubernioj Luhi, Jinggiang, Ĵujli, Longĉuan, Lianghe, Baŝan k.a., la ceteraj dise en Ĝenkang-gubernio kaj la Gengma-a Taj-nacieca Aŭtonoma Gubernio.

Krom la nomo benglung, la benglung-a nacieco sin nomas ankaŭ per aliaj pli ol 20 nomoj kiel “ang”, “leng” kaj “jumaj”. Pro la diferencoj de la dialektoj kaj kostumoj, ili estas respektive nomataj ruĝaj benglung-oj,

buntaj benglung-oj, nigraj benglung-oj kaj blankaj benglung-oj.

La benglung-a lingvo apartenas al la va-benglung-a lingvogrupo de la sudazia lingvosistemo. Pro longtempa interkontaktiĝo kun taj-oj, han-oj, ĝingpo-oj k.a., la benglung-oj scipovas paroli ankaŭ la lingvojn de tiuj naciecoj.

La junuloj de benglung-a nacieco ŝatas porti bluŝtofan kamizolon, nigran pantalonon kaj kaptukon en nigra kaj blanka koloroj, kaj ĝiaj junulinoj mallongan jupon kun ruĝaj, bluaj kaj flavaj strioj kaj striktan kamizolon.



Benglung-aj komunumanoj en vespera politika kurso

En ambaŭ finoj de iliaj kaptukoj troviĝas diverskoloraj bulkvastoj, kaj ĉirkaŭ ilia talio rotanga zonumo. Arĝentaj orelringoj, ĉirkaŭkoloj kaj braceletoj estas ornamaĵoj ŝatataj de ili.

La lokoj loĝataj de la benglung-oj situas en subtropika zono kun abunda pluvo, graso grundo kaj riĉaj mineraloj. Tie kreskas abunde bambuo, kies trunko dikas ĉ. 30 centimetrojn. Ĝi estis nomata, en nia antikva historio, pu-bambuo.

Laŭ unuapaŝa esplorado de historiistoj la ajlaŭji-oj en la dinastioj Kin kaj Han antaŭ ĉ. 2,000 jaroj estas ĝuste la praavoj de la hodiaŭaj benglung-oj. Ili dislokiĝis sur la bordoj de la riveroj Lancang kaj Nugiang kaj Ajlaŭ-montregiono. En la jaro 109-a a.K. en Han-dinastio, pro la influado de han-nacieco la benglung-oj jam komencis kulturajn grenojn, bredi silkraŭpojn kaj fari tekstiladon kaj brodadon. En la 13-a jarcento la benglung-oj jam eniris en la ekonomian periodon de feŭdaj mastrosinjoroj. Tiam, en ĉiuj lokoj oni komencis kulturajn rizon kaj samtempe, ili havis metiojn de fero, ligno, ŝtono, bambuo kaj ceramiko. Nun troviĝas multaj rimarkindaj historiaj restaĵoj en la montaro en la okcidenta parto de Gaŭligong-montaro en la Dehong-a Taj- kaj Ĝingpo-a Aŭtonoma Subprovinco, en okcidenta Junnan-provinco, kiel ekzemple la antikva pagodo en Ĵujli-gubernio kaj la postrestaĵo de granda vilaĝo en Luhi-gubernio. Ĉio ĉi tio estas kulturaj restaĵoj de la benglung-oj.

La benglung-oj ĝenerale apartenas al hinaĵano. Plejparto de iliaj vilaĝoj havas templon, la peza ŝarĝo kaj severa disciplino de la religio grave malhelpis la produktadon kaj vivon de la benglung-oj. Post la Liberiĝo, sekve de la senĉesa altigo de la politika konscio de la benglung-aj popoloj, iliaj feŭdaj superstiĉaj pensoj estas iom post iom forĵetitaj.

En la fino de la 19-a jarcento, kiam la brita imperiismo invadis la limregionon en Junnan-provinco de nia lando, la benglung-oj heroe batalis kune kun la ĝingpo-oj kaj de-



Benglung-a "nudpieda" kuracisto ekzamenas infanon.

fendis la teritorion de la patrolando. En la jaro 1941, kiam la japanaj agresantoj invadis la okcidentan parton de Junnan-provinco, la benglung-oj aktive partoprenis en kontraŭjapana gerila taĉmento konsistanta el han-oj, taj-oj k.a., kaj donis al la agresantoj fortajn batojn kaj faris sian kontribuon en la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Antaŭ la Liberiĝo ĉe la benglung-oj ankoraŭ troviĝis restaĵo de la sistemo de primitiva komunumo kiel kolektiva posedsistemo de sekaj kampoj. Pro la disa loĝado kaj longa vivado sub la regado de feŭdaj taj-aj regantoj plejparto de la benglung-aj kamparanoj vivis tre mizere. Nur 2% de la benglung-oj estis riĉuloj kiuj estis nomitaj de taj-aj lokaj regantoj kiel ĉefoj. La malriĉaj benglung-aj kamparanoj devis labori kiel dungitoj kaj farmuloj de taj-aj lokaj regantoj, benglung-aj ĉefoj kaj han-aj bienuloj.

En 1950, la benglung-oj estis liberigitaj. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, oni kondukis reformadon laŭ la efektivaj kondiĉoj de la benglung-a socio kaj poste, starigis agrikulturajn interhelpajn

grupojn kaj kooperativojn. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, sur la bazo de la agrikultura kooperativigo la benglung-oj efektivigis popolkomunumigon. Per siaj kolektivaj fortoj la benglung-oj hakis montojn por konstrui irigaciajn kanalojn kaj kreis kampojn sur montodeklivoj. Kaj utiligante la favorajn naturajn kondiĉojn ili aktive kulturas ekonomiajn plantaĵojn kiel tearbojn, kafarbojn, sukerkanojn kaj kotonon kaj bredas lakoinsektojn.

Santaj-montregiono en Lusi-gubernio estas loko koncentre loĝata de benglung-oj. De la komenciĝo de la koopera movado en 1956, la benglung-oj batalis kune kun han-oj kaj ĝingpo-oj en solidareco por ekspluati Santaj-montregionon kaj tute novigis la fizionomion de tiu regiono. En la lastaj 2-3 jaroj, la areo de la agraro kaj la hektara produktokvanto de greno de tiu regiono pliiĝis je pli ol 3-oblo kompare kun tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo.


La benglung-a produkta brigado de Benlong-komunumo en Ĝenkang-gubernio estas alia regiono koncentre loĝata de benglung-oj. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ

kaj Konfucio, tiu brigado forte kritikis la damnindan krimon de Lin Biaŭ kaj liaj sekvantoj, kiuj intencis restaŭri kapitalismon. Dank' al tio ili fariĝis pli energiaj en konstruado de la montregiono. Post penema lukto en du jaroj ili fosis 4 irigaciajn kanalojn, kaj dank' al tio la areo de la rizkampoj plivastiĝis je pli ol 6 hektaroj. Krom tio, por efektiviĝi la principon elmetitan de Prezidanto Maŭ "plenamplekse disvolvi produkton kun tiu de greno kiel ĉefĉenero", ili starigis kaŭĉukarban ĝardenon, teĝardenon, bredas lakoinsektojn, porkojn kaj aliajn brutojn. En 1972, la totala produktokvanto de greno de tiu regiono atingis pli ol 305 tunojn, kaj ĉiu homo havis meznombro pli ol 500 kg.

Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la produktado de la benglung-oj disvolviĝas, ilia ekonomio prosperiĝas kaj ilia vivo pliboniĝas jaron post jaro. Nun la benglung-oj jam havas sian unuan generacion de studentoj, iliaj infanoj ĝenerale ricevas edukon, ilia higiena afero pli kaj pli boniĝas kaj la nivelo de sano de la popolo senĉese altiĝas. Nombro da benglung-aj kadroj, laboristoj, kuracistoj, instruistoj, aktoroj kaj traktoristoj kreskas sane.



He Lapiaŭ (la meza), benglung-a vicestro de la revolucia komitato de Santajŝan-komunumo kun komunumanoj



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

N-ro 11 (208) 1975

Ĉefa Enhavo

Marŝas la nova socialisma Tibeto	1
Antaŭen marŝu, Lasao!	5
Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio	8
Popoloj de Hingiang, mastroj de la ŝtato	14
La prospera Kunes-stepo	21
Niutoŭ, vilaĝo de herooj	26
Kunveno de solidareco kaj amikeco	31
Batalo kontraŭ hajlo por riĉa rikolto	34
Malgrandaj akvoturbinoj	38
Kvin jaroj en kamparo	42
Intima interparolado sur Songhua-rivero	45
Vizito al blindula fabriko	49
Ho, Samsangaj Fratoj Niaj en Tajvan (kanto)	52
Kiel ni verkis la kanton "Ho, Samsangaj Fratoj Niaj en Tajvan"	54
La benglung-oj	56



Transformo de la naturo por altigi produktadon

Ĉirkaŭmontaj kanaletoj irigacias kampojn.






La komunumanoj de Vugongling-brigado de Anhuj-provinco konstruis pli ol 200 muojn da ŝtuparaj teĝardenoj kaj bonaj kampoj dum 6 jaroj sur dezertaj montoj je 1,000 metroj super la mar-nivelo. Dank' al zorga flegado kaj plibonigita irigaciado, la produkta kvanto de greno de la tuta brigado en 1974 plialtiĝis de 180 tunoj ĝis pli ol 250 tunoj, kaj tiu de teo plialtiĝis de 39 tunoj ĝis 61 tunoj. Nun Vugongling jam fariĝis nova montvilaĝo bela kaj riĉa.


Kadroj de la partia filio kaj komunumanoj de la brigado faras enketadon por ellabori disvolvan planon de agrikulturo.

Stonoza kaj sterila deklivo fariĝis bonaj ŝtuparaj kampoj



Prezentado por paŝtistoj sur altebenaĵo


Membroj de la Nacia Ensemblo de King-
haj sur vojo al paŝtistoj por prezentado



Maldekstre: *Prezentado de la revolucia moderna baledo Blankhara Knabino por tibetnaciecaj paŝtistoj*




Forstumado




Forstumado estas farita sur 14,300 hektaroj da tero en Hanĉeng-gubernio de Sanhi-provinco. Jen arbaro de komunumo en ĉirkaŭaĵo de la urbo.



Dekstre: Aktorinoj lernas popolan dancon de paŝtistinoj.



Amasoj de Maŭvusu-dezerto en nordokcidenta Ĉinio faras forstumadon por transformi la dezerton.




Arbaro kulturata ĉe marbordo de Lejĝou-duoninsulo de Guangdong-provinco multe helpas agrikulturan produktadon.

Huangŝan


-monto

Huangŝan-monto kun areo de 1,200 kvadrataj kilometroj situas en la suda parto de Anhuj-provinco. Kiel unu el la ĉinaj famaj pitoreskejoj, ĝi allogas turistojn per siaj grandiozaj kaj kuriozaj ŝtonaj montpintoj, fortikaj kaj ĉarmaj verdaj pinoj, klaraj neelĉerpeblaj fontoj kaj ondanta nubmaro. Kvankam bela, ĝi tamen estis okupata de reaciaj regantoj antaŭ la Liberiĝo kaj fariĝis loko por ilia diboĉado. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj la registaro, tuj stariĝis tie administrejo, kiu protektis kaj reordigis la historiajn vidindaĵojn, riparis kaj konstruis pli ol 100 liojn da ŝtuparoj, malfermis novajn ekskursejojn kaj konstruis hotelojn, sanatoriojn, termofontan naĝejon k.a., tiel ke ĝi fariĝis granda parko vere por la laboranta popolo.

Sur la dorskovrilo:
Kingliangtaj



Ŝtonaj bambuidoj




Bejhaj-hotelo en alteco de 1,630 metroj super la marnivelo



Rododendroj sur alta monto

Meteostacio





6282V